

# EL POPOLA ĈINIO

中國藝道

9  
1999

ISSN 0032-4364



Tibetanoj pri la nova kaj  
malnova Tibeto

Projekto pri protekto de  
arbaroj en Ĉinio

Lando de longvivuloj



Popeye-vilaĝo sur la Insulo Malta

de OTMAR WEBER (Aŭstrio)

Ege plaĉis al mi la artikolo "Brilanta ĉina muziko", aperinta en EPC n-ro 5/99, ĉar mi ĉeestis la koncerton la 27-an de januaro 1998. Vere la aŭskultantoj el Vieno raviĝis de la ĉina nacia arto kaj aplaŭdadis longe, eĉ tondre.

Poste mi skribis raporton pri tiu ĉi novjara koncerto kaj ĝi estis disaŭdigita de Radio Aŭstria Internacia la 15-an de februaro 1998. La sama raporto aperis en Aŭstria Esperanto-Revuo n-ro 1-3/1998.

**LEOPOLD PATEK** (Aŭstrio)

En la numeroj 1-5/99 mi renkontis en ĉiu rubriko artikolojn kun tre interesa enhavo, ofte formigitajn altanivele. Granda parto de la fotoj ankaŭ estis bonegaj. Apud multaj aliaj artikoloj plejmulte plaĉis al mi: 1/99: "Vojaĝo en Tibeto" kaj "Pudong — bona loko por investantoj"; 2/99: "Esploro kaj disvastigo de hibridigita rizo" kaj "Kuriozaj moroj en manĝado"; 3/99: "Poezio en akvarelo: kaj Aŭreolo de herezulo"; 4/99: "Libro de ligno" kaj "Mengshan-teo"; 5/99: "Studentoj kaj ilia laborserĉado" kaj "Familioj sur altebenaĵo".

Nun mi esperas, ke la multe laŭdata rubriko "Laŭ la Silka Vojo" baldaŭ estos anstataŭota por alia rubriko, kiu okupiĝos kun similaj temoj historiaj, geografiaj kaj sociaj en Ĉinio.

**HANS-BURKHARD DIETTERLE** (Germanio)

La plej grava valoro de EPC estas, ke ĝi montras Ĉinion kaj la ĉinan kulturon al la mondo. Ĝi estas en pluraj trajtoj alia ol la nia, sed tio ne signifas, ke ni ne povas multon lerni de Vi, same kiel Ĉinio transprenas multon el aliaj kulturoj.

**JIRI LAUBE** (Ĉeĥio)

Tial, kiam mi trovis en malnovaj bretaroj de nia asocio, ĉi tie en Milano, multajn revuojn de EPC de 1952 ĝis 1992, mi tre zorge kolektis kaj dividis ilin, poste mi bindigis ilin en nur 10 volumoj, ĉar la jaroj de la revuoj ne estis kompletaj.

Hodiaŭ tiuj volumoj tronas en mia biblioteko, kun verda kovrilo kaj orskribaĵo.

Mi ŝatas tre multe legi la malnovajn numerojn, remalkovri la okazintaĵon de la historio, sed pli multe sekvi la evoluon de la popola Ĉinio dum lastaj 40 jaroj.

**CONTI GIOVANNI** (Italio)

# El Popola Ĉinio

9 [492] 1999



Hani-aj knabinoj

Foto de Liu Sigong

Hani estas unu el la 56 nacioj de Ĉinio. La saĝaj kaj laboremaj hani-oj havas sian riĉan kulturon kaj per siaj lertaj manoj kreis kolorriĉajn vestojn. En festotagoj la knabinoj portas belajn vestojn faritajn de ili mem por montri sian vesto-kulturon.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto:


epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/ElPopolaCxinio>>

# ENHAŬO

- |    |   |   |
|----|---|---|
| 2  | <b>INTER NI</b>   | Distingiĝaj vestoj de hani-oj   |
| 4  | Tibetanoj pri la nova kaj malnova Tibeto  | 28 <b>EN ĈINAJ URBETOJ:</b><br>Lando de longvivuloj                     |
| 6  | <b>EKONOMIE:</b><br>Projekto pri protekto de arbaroj en Ĉinio; Ŝanĝiĝoj en 50 jaroj (II); Kurantaj aferoj | 32 <b>SERĈO DE SHANGRILA:</b><br>"Maro" kaj templo sur altebenaĵo       |
| 8  | <b>JUNULARO:</b><br>Heroo de la ĉina komputera industrio  | 36 De Schlappner al Houghton (I)  |
| 9  | <b>KORESPONDI DEZIRAS</b>   | 38 <b>ĈINA KULTURO:</b><br>Antikvuloj kaj floroj                        |
| 10 | Fiŝista vilaĝo sur maro   | 40 Vizito al Makao (II)   |
| 12 | Impresoj pri Japanio  | 41 Sinjoro Dongguo kaj lupoj (Fablo)                                    |
| 14 | <b>ORIGINALE VERKITAĴ:</b><br>Poemoj  | 42 <b>ORDINARAJ ĈINOJ:</b><br>Vilaĝo ĉe antikva Granda Muro             |
| 15 | <b>ESP-NOVAĴOJ</b>  | 44 <b>EL ĈINAJ GAZETOJ</b>  |
| 16 | <b>POR KOMENCANTOJ:</b><br>Legomĝardenoj de rusoj   | 46 "Ĉar mi bone konas ilin"   |
| 17 | <b>AMUZO</b>  | 48 La ĉina lingvo kaj la ĉina kulturo (II)                              |
| 18 | Koruso el mil personoj  | 50 <b>POR VIA SANO:</b><br>Pli kaj malpli...                            |
| 20 | Feriaj kamparanoj   | 51 <b>ĈINAJ POŝTMARKOJ:</b><br>En mara mondo                            |
| 21 | <b>NUNTEMPA BELARTO:</b><br>Portreti antikvulojn  | 2 <b>FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:</b><br>Popeye-vilaĝo sur la Insulo Malta |
| 24 | Sango-donacado en Ĉinio   | <b>SUR LA DORSKOVRILO:</b><br>Lageto Nigra Drako ĉe Lijiang-rivero      |
| 25 | <b>VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ:</b>  |   |



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- |                          |                            |
|--------------------------|----------------------------|
| 1. Sichuan-prov. (p. 28) | 4. Guangdong-prov. (p. 44) |
| 2. Makao (p. 40)         | 5. Tianjin (p. 44)         |
| 3. Tibeto (p. 4)         |                            |

# Tibetanoj pri la nova kaj malnova Tibeto

- Antaŭ 40 jaroj kiam oni abolis servutecon en Tibeto, la meznombra vivdaŭro de tibetanoj estis nur 30 jaroj.
- Nun pli ol 500 tibetanoj oficas en la registaroj.
- Nobelo Lhalu el malnova Tibeto daŭre kontribuas al la progreso de Tibeto.

de GUO SHI

**Ĉ**I-JARE estas la 40-a datreveno de abolicio de servuteco kaj praktiko de la Demokratia Reformado en Tibeto, kaj okaze de tio mi vizitis kelkajn tibetanojn por aŭskulti iliajn opiniojn pri la ŝanĝiĝo de Tibeto en la pasintaj 40 jaroj. Antaŭ 40 jaroj ili estis aŭ servutuloj, aŭ nobeloj, aŭ monaĥoj.

Luosang havas 60 jarojn. Antaŭ la abolo de servuteco liaj gepatroj servis al du servutmastroj, kaj li paŝtis ŝafojn kaj bovojn por la mastro ekde la aĝo de 6 jaroj. Tiam la 7 membroj de la familio de Luosang loĝis en mizera terkabano de malpli ol 10 kvadrataj metroj. La frato estis forvendita de la mastro pro ŝuldo de 5 kilogramoj da sekalo. La fratino, ne elteninte kruelan torturadon, fuĝis al Hindio, kaj ĝis nun venis nenia informo pri ŝi. Poste lia patro estis batmortigita de la mastro. Ankaŭ Luosang estis torturita de la mastro. Cikatroj nun ankoraŭ klare videblas sur lia korpo.

Luosang diris al mi, ke la burkrotoj, nobeloj kaj superaj monaĥoj, kiuj konsistigis malpli ol 5 elcentojn de la totala loĝantaro de Tibeto, estis nomataj "la tri grandaj mastroj". Ili posedis preskaŭ ĉiujn kampojn, gresejojn kaj grandan parton de la brutaro. La sklavoj estis laŭvole vendeblaj, transdoneblaj, donaceblaj, hipotekeblaj kaj interŝanĝeblaj. La



En la korto de kamparano en antaŭurbo de Lhasa

mastroj povis kapricvole detranĉi iliajn orelojn, manojn aŭ eĉ dronigi ilin. Geedziĝo de la sklavoj bezonis konsenton de ilia mastro, kaj iliaj infanoj estis denaskaj sklavoj. Ili loĝis en mizeraj terkabanoj, kaj multaj el ili, ne povante elteni la kruelaĵojn de la mastroj, fuĝis almozpetante. En la tibeta ĉefurbo Lhasa nun loĝata de pli ol 400 000 loĝantoj, tiam estis nur 30 000 homoj, dum pli ol 4 000 el ili estis almozuloj. La meznombra vivdaŭro de tibetanoj tiam estis nur 30 jaroj.

En 1959 Tibeto abolis la servutecon daŭrintan pli ol 1 300 jarojn. Same kiel tiu de la liberigitaj servutuloj radikale ŝanĝiĝis la vivo de Luosang. En 1960, la 22-jara Luosang akiris laboron kaj unuafoje ricevis salajron. Li havas 5

infanojn, kaj du el ili estas ŝtataj dungitoj, du sin okupas per komercado, kaj la plej juna estas lernanto. Li havas domon kun bela ĝardeno. Luosang estas unu el la pli ol 2 000 popolaj reprezentantoj de la Tutlanda Popola Kongreso, la plej alta organo de la ŝtato.

Luosang bone scias la ŝanĝojn de Tibeto en la pasintaj dekoj da jaroj. Li diris, ke antaŭ 50 jaroj, Tibeto ne havis ŝoseon, nek aŭton, kaj nobeloj ĉiam vojaĝis transportate de sklavoj. La ir- kaj revena vojaĝo de Lhasa al Xining, ĉefurbo de Qinghai-provinco, bezonis ses monatojn kaj iam eĉ unu jaron. Multaj sklavoj mortis survoje pro lacego de la longa vojaĝo. Nun 2 000-kilometra aŭtovojo interligas Lhasa kaj Xining, kaj la vetura-

do inter la du urboj bezonas nur 2-3 tagojn. Antaŭe la sklavoj de Tibeto estis tute fremdaj al medicino, kaj multaj mortis pro malsano aŭ lacego. Nun en Tibeto servas diversnivelaĵaj medicinaj kaj sanprotektaj establoj. Pliboniĝis la vivo de la tibetanoj kaj plilongiĝis ilia vivdaŭro. La patrino de Luosang transvivis 88 jarojn, kaj la meznombra vivdaŭro de la tibetanoj estas 65 jaroj.

Qimei Zeba devenis de nobela familio kaj nun oficas kiel vicprezidentino de la Virina Federacio de Qamdo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono. Ŝi diris, ke en la malnova Tibeto virinoj ne rajtis kontakti politikajn aferojn, sed post la

Demokratia Reformado radikale ŝanĝiĝis la stato. Nun pli ol 500 tibetaninoj oficas sur la postenoj je la rango pli alta super la gubernia nivelo. Nun en Tibeto laboras juĝistinoj, prokurorinoj, advokatinoj k.a. Fama sopranulino Caidan Joma ŝatis kanti de la infaneco, sed ŝi ne havis la ŝancon viziti lernejon nek revis fariĝi kantistino. En 1959 ŝi ricevis profesian trejnadon. Ŝiaj kantoj nun aŭdiĝas tra la Tibeto kaj la tuta Ĉinio. Krome ŝi vizitis pli ol 30 landojn.

Lhalu Ciwandoje devenis de tia familio, el kiu naskiĝis la 8- kaj 12-a Dalai-lamaoj, kaj li mem estis unu el la kvar ĉefaj oficistoj de la tibeta registaro de Dalai-lamao.

La telekomunika domo en Lhasa



Tibetano melkanta

Li observas la konstitucion de la Ĉina Popola Respubliko, oponas kontraŭ la naciisma splitismo kaj subtenas la Demokratian Reformadon. En 1959 li fariĝis oficisto en la nova registaro de Tibeto. Nun li, 85-jara, daŭre oficas kiel vicprezidentino de la Tibeta Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (ĈPPIK) kaj membro de la Tutlanda Komitato de ĈPPIK. Lia edzino estas membro de la Tibeta Komitato de ĈPPIK. Nun li estas iom senila, sed daŭre prizorgas la progreson de Tibeto.

Jukan Tudenkeju estas abato kaj viva budho en iu antikva templo de Tibeto. Li diris al mi, ke kompare kun la stato antaŭ 40 jaroj, la plej granda ŝanĝiĝo de lia hejmloko Naqu manifestiĝis en pliboniĝo de la vivo de la paŝtistoj. Antaŭe la loko ne havis ŝoseon, sed nun ĉiuj vilaĝoj estis interligitaj per ŝoseoj, kaj preskaŭ ĉiuj paŝtistoj havas fiksan loĝejon kaj finis la nomadan vivon. Antaŭe en Naqu ne estis lernejo, sed nun ĉiuj gubernioj havas mezlernejon kaj ĉiuj distriktoj havas elementan lernejon. Antaŭ la Demokratia Reformado, pro malriĉeco kaj trafika malfacilo, multaj el la paŝtistoj neniam faris vojaĝon, sed nun ili povas viziti Lhasa kaj kulti budhojn en la temploj.

Jukan diris, ke antaŭe vivaj budhoj sin okupis nur pri lernado kaj recitado de sutroj. Nun la vivaj budhoj partoprenas en politikaj aferoj kaj interkonsiliĝas pri la ŝtataj aferoj. Samtempe ili havas kutiman religian vivon. Li opinias, ke nun ilia vivo estas pli enhavoriĉa ol antaŭe. ■

# Projekto pri protekto de arbaroj en Ĉinio

de HAN LIN

**B**RIDI arbohakadon kaj protekti arbarojn estas atentata de la popolo. Post la granda inundo en 1998, lokaj regis-

taroj decidis ellabori severajn rimedojn por protekti arbarojn. Sichuan-provinco tuj proklamis malpermesi hakadon. Poste oni lanĉis projekton pri protekto de ĉefaj arbaroj en Ĉinio.



Ibisoj en rezervejo de Shaanxi-provinco

Estas kategorioj de primitiva, regenera, difektita kaj aliaj arbaroj. Nun en Ĉinio troviĝas arbaroj kun areo de 87.26 milionoj da hektaroj, inter kiuj la regenera kovras grandan areon kaj la primitiva nur 2%. La projekto koncernas kontinuajn arbarojn, kiuj okupas areon de 29 milionoj da hektaroj.

La projekto malpermesas arbohakadon en 1998-2000 kaj prosperigas arbarkulturadon en 2001-2010.

Antaŭe la ekonomia valoro altiris homojn al troa arbohakado. Arbohakado kaj ligna prilaboro fariĝis ĉefa branĉo de la ĉina arbarkulturo. En la 50-aj jaroj lignoprodukto konsistigis 6-7% de la totala nacia produktovaloro, sed nun nur 1%. Troa arbohakado kaŭzos neimageblan malfeliĉon.

Fakte la ekologia kaj socia valoroj de arbaro estas pli altaj ol tiuj de ekonomio. Ekzemple arbaro povas retenigi akvon kaj grundon, defendi kontraŭ sablovento kaj purigi aeron. En la arbarkultura ekonomio, krom lignolivero

La rezervejo de natura arbaro en Yunnan-provinco

oni povas fari ankaŭ lignan prilaboron, drogherban kolektadon, kemian produktaĵon kaj arbaran turismon.

La projekto celas ŝanĝi la tradicion de ĉinoj pri arbarkulturo. Oni devas unue emfazi ĝian ekologian valoron, poste ĝiajn ekonomian kaj socian valorojn. Eble arbohakistoj perdis sian laboron, tamen ili povas vivteni sin per kemiaĵa produktado, naturmanĝaĵa produktado kaj arbara turismo. En Ĉinio oni nun konstruis 574 arbarajn rezervejojn kaj pli ol 3 000 arbarajn parkojn. Laŭ statistiko de arbarkultura departemento, oni liveras al la socio pli ol 1 100 arbarajn produktojn.

La entreprenoj, kiuj dependas de arbaro, devas ĉefe prizorgi la arbaron. Laboristoj de la entreprenoj fariĝos gardistoj de arbaro. Aliaj laboristoj hakos arbojn ĉefe en forsto aŭ prilaboros lignon. Laŭ statistiko, nun en Ĉinio ekzistas pli ol 33 milionoj da hektaroj da forstoj, kiuj povas liveriĝi al la socio.

En aliaj lokoj la arbarkultura departemento dividas arbarojn en ĉefe protektatan ekologian arbaron, ordinaran ekologian arbaron kaj forston por komerco (po 30-40%). ■

## KURANTAJ AFEROJ

● La 10-an de majo en la satelitanĉena centro en Taiyuan ĉinoj sukcese lanĉis raketon "Changzheng 4B", kiu portis meteo-observan kaj scienc-eksperimentan satelitojn en orbiton 870 km super la terglobo kaj sinkronan kun la suno.

Laŭ specialisto, la sukcesa lanĉo de la 2 satelitoj akcelas ĉinan meteo-observan modernigon kaj levas la kapablon prognozi katastrofan veteron.

● Produktiĝis la komputila sistemo "Esploro 108". Kvankam miniatura, ĝi havas funkcion similan al tiu de granda komputilo. Ĝia operacio atingas 16 miliardojn da fojoj sekunde. Ĝi montras, ke ĉinoj ne nur kapablas mem fari avangardan

# Ŝanĝiĝoj en 50 jaroj (II)

de ZHENG ZHENJIE

EN la 50-60-aj jaroj pro manko de vivnecesaĵoj, oni devis uzi kuponon por aĉeti grenon, oleon, ŝtofon, sukeron kaj aliajn. Iu fama ĉina anoncistino de televida stacio memoras, ke siatempe ŝi respondecis pri distribuo de la ŝtofokuponoj de la familio. Por novjaraj vestoj de la familio ŝi faris detalan kalkulon kaj aranĝon. Ŝi ofte aĉetis ŝtofon je rabato, ĉar por tia ŝtofo oni postulis malmulte da kuponoj. Foje ŝi volis aĉeti novan veston por sia frateto, sed tiom da kuponoj en la mano ne estis suf-

iĉaj. Tio profunde impresis ŝin.

Tia vivo pli kaj pli malproksimiĝas de la nunaj ĉinoj. La diversaj kuponoj fariĝas kolektaĵo. Oni povas en magazeno libere aĉeti ĉian varon sen kupono. La ŝanĝiĝon en 50 jaroj klare vidis la popolo. Anstataŭ biciklo, stebmaŝino, radioaparato kaj brakhorloĝo, oni nun atentigas televidilon, fridujon, telefonon, klimatizilon kaj eĉ aŭton. La nutroriĉaj manĝaĵoj kaj belaj vestoj pli plaĉas al la popolo. Komprenoble en Ĉinio ankoraŭ estas 42 milionoj da homoj, kiuj vivas malfacile. Jen ciferoj pri la ŝanĝiĝo. ■

	1978	1998
Malriĉuloj (miliono)	250	42
Averaĝa enspezo de kamparano (juano)	133.6	2150
Averaĝa enspezo de urbano (juano)	316	5454
Pokapa loĝ-areo de kamparanoj (m <sup>2</sup> )	8.1	22.5
Pokapa loĝ-areo de urbanoj (m <sup>2</sup> )	3.5	8.8
Mono de la popolo deponita en banko (miliardo da juanoj)	21.06	6000
Televidiloj de po 100 kamparaj familioj		93
Kolorotelevidiloj de po 100 urbaj familioj		100.5

komputilon, sed ankaŭ altigas la kapablon de konkurenco kun aliaj landoj pri nacidefendo kaj intelekta proprieto pri altteknikaj produktaĵoj.

● Ĝis la 30-a de aprilo 1999, la nombro de entreprenoj investitaj de fremdlandaj komercistoj, sankciitaj de Ĉinio, atingis 329 637. Ili preparis 583.94 miliardojn da usonaj dolaroj, sed fakte ili uzis 277.69 miliardojn.

● Neniu scias, kial Weigan-rivero de Xinjiang perdas 200 milionojn da kubmetroj da akvo ĉiujare. Post esplorado specialistoj trovis grandegan subteran akvokonservejon kun 200 milionojn da kubmetroj da akvo. Oni povas elpreni 120 milionojn da

kubmetroj da akvo ĉiujare. La akvo, malprofunde konservata, povas akvumi 20 000 hektarojn da kampoj. Ĝia utiligo ne kaŭzos malleviĝon de akvonivelo kaj ŝanĝiĝon de geome-

dio. ● Ĉinaj petrolgeologiaj specialistoj trovis krudan naftotavolon en Qaidam-baseno de Qinghai-provinco. Ĝi dikas 1 727 metrojn kaj areas 23 000 kvadratajn kilometrojn. La rezervokvantoj de nafto kaj naturgaso estas 1.7 miliardoj da tunoj kaj 300 miliardoj da kubmetroj respektive.

● Nun en Ĉinio jam fondiĝis 926 naturparkoj, kiuj kovras 7.64% de la totala areo de la lando. La meza procento de la mondo estas 7%.

# Heroo de la ĉina komputera industrio

*La ekonomio de scioj elbakis multajn heroojn en la ĉina komputera industrio. Bill Gates de Microsoft, Jerry Yang de Yahoo! estas bone konataj de ĉinoj. Famas en Ĉinio ankaŭ Yang Yuanqing, vicprezidanto de la Grupo Legend, la plej granda komputera entrepreno de Ĉinio. Yang, nur 36-jara, laboris dek jarojn en Legend. Anstataŭ lerni eksterlande aŭ labori en famaj kompanioj eksterlandaj li elektis la ĉinan entreprenon kiel sian startpunkton. La artikolo de Xiong Bo, ĵurnalisto de la Ĉina Junula Ĵurnalo, prezentas al ni la heroon de la ĉina komputera industrio.*

Yu Tao


de XIONG BO

## ALIĜI AL LA GRUPO LEGEND

En 1981 Yang Yuanqing eniris en Jiaotong-universitaton de Ŝanhajo por studi komputeron, kaj en 1986 li fariĝis esplorstudento de la Ĉina Scienc-teknika Universitato en Hefei. Por plenumi sian diplomigan disertaĵon, li vizitis Pekinon. Tiam li deziris poste daŭrigi sian studadon en Usono.

Ĉe la fino de la 80-aj jaroj, ĝenerale diplomigintoj de scienc-teknika fako de famaj universitatoj preferis studi eksterlande. Yang diris, ke du trionoj de liaj kunlernantoj de Jiaotong-universitato iris eksterlanden, kaj nun la nombro de liaj kunlernantoj laborantaj en la Silicia Valo de Usono estas pli multa ol tiu en Pekino.

En 1988 famaj alilandaj komputeraĵoj unu post alia ekhavis sian filion en la elektrona strato Zhongguancun en Pekino — Silicia Valo de Ĉinio. Tio prezentis la perspektivon de la ĉina komputera industrio. Por poste povi iri eksterlanden, Yang, 25-jara, decidis unue serĉi okupon en Zhongguan-



S-ro Yang Yuanqing

cun, do li, antaŭ ol diplomigi, fariĝis membro de Legend. Tiam la kompanio Legend ne estis tiel moderna kiel nun. La sektoro, kie li laboris, respondecis samtempe pri vendado, muntado, riparado kaj enketo pri merkato. Tio kulturis en li diversafankajn kapablojn. Krome liaj kolegoj plejparte estis spertaj fakuloj el la Ĉina Akademio de Sciencoj. En tia bona cirkonstancaro li decidis bone plenumi la laborojn en Legend, kvankam li

ankoraŭ deziris studi kaj labori eksterlande.

## ALLOGO DE EKSTERLANDO

En la komenco de 1991 Legend promociis Yang direktoro de la Sektoro de Asista Desegnado de Komputero. La ĉefa tasko de la sektoro estis peri produktaĵojn de la Korporacio Hewlett-Packard (HP). Yang diris, ke en la du jaroj li multe lernis merkatajn aferojn.

Ankaŭ la ĉina komputera en-



treveno kreskis en lernado. Liu Chuanzhi, prezidanto de la Grupo Legend, diris: "En la kunlaboro kun HP, profito estas nia kromprodukto. Ĉefe estas, ke ni akiris sperton en administrado kaj elbakis lertajn gvidantojn. Tiaflanke oni povas diri, ke la Korporacio Hewlett-Packard estas nia instruisto."

Ĉar Yang estis la plej bona vendanto de produktaĵoj de HP, li estis honorita per la medalo "La Plej Sukcesinta Peranto de HP".

En aprilo 1993 la prezidanto de HP vizitis Liu Chuanzhi, kaj ĉi tiu prezentis Yang al li. Nelonge poste la ĉefstabejo de HP invitis Yang labori por ĝi. Tio estis tre alloga.

## LATENTA FORTO ELVOLVITA PRO DEFIO

Ĝuste en la sama jaro famaj eksterlandaj komputeraĵoj kompanioj sinsekve eniris en la ĉinan komputeran merkaton, kiun iliaj produktaĵoj preskaŭ monopoligis. Tiujare Legend ne plenumis sian planon. Liu diris: "Ni malvenkis."

Antaŭ la fortaj rivaloj la ĉina komputera entrepreno sentis minacon de pereco. Liu Chuanzhi malsaniĝis. En hospitalo li interparolis kun Yang kaj esperis, ke li restos en la grupo en konsidero de la intereso de la entrepreno.

Yang poste diris: "En la interparolo kun Liu mi pli profunde sentis la devon por la nacio. Eble pro liaj vortoj Yang retiris sian ideon iri eksterlanden. Li decidis resti en Ĉinio por akcepti la defion.

Marte de 1994, Yang Yuanqing fariĝis ĝenerala direktoro de la nova Sektoro de Komputera Ekspluato de Legend.

Li estis feliĉa, ĉar al li Legend prezentis senliman scenejon por disvolvi lian talenton. Li opiniis, ke tio por li estas pli alloga ol alta enspezo.

Li reformis la sektoron: duonigis la nombron de laborantoj, koncentris la aferojn pri komputero en sia sektoro kaj anstataŭ vendadi per Legend mem, li peris ĝi-

ajn produktaĵojn al aliaj. Rezulte la vendokvanto de komputeroj en tiu jaro estis duoble kiom tiu en 1993.

## HEROO DE LA EPOKO

Dum Yang Yuanqing sin dediĉis al reformado de sia sektoro, li neglektis la rilatojn kun aliaj sektoroj. Liu unuflanke montris subtenon al liaj ĝustaj paŝoj, aliflanke severe kritikis lin pro lia neglekto al la interesoj de la tuta grupo.

Yang poste komprenis, ke vivojo estas longa, tamen gravaj nur kelkaj paŝoj. "Tiam mi konfuziĝis de la kritiko, tamen se ne estus tiu kritiko, mi ne ellernus kompromisi. Mi ja multe lernis el tio."

Antaŭ 1996 la ĉina komputera merkato funkciis laŭ la usona maniero — kiam promociita produkto enmerktiĝis, la prezo estas tre alta, samtempe tiu de la malnovtipa malleviĝis. Tiam iuj distrumpetis la plur-uzon de novtipa komputero kaj aliaj ĝuis la malmultkostecon

de la iama novtipa. Tio malbone influis la disvolviĝon de la komputera industrio de Ĉinio. Yang decidis malfermi la novan vojon — difini malaltan prezon, kiu egalas nur tiun de la lastjara tipo de alilandaj kompanioj.

Li ne sciis, kio estos la rezulto. Post unu monato ĝi montris: profitas! En 1996 la ĉina komputera merkato iom ŝanĝiĝis: la ĉefa tipo de komputero sinkronis kun la internacia; la prezo de novtipa komputero estis maksimume 15 000 juanoj (ĉ. 1 800 usonaj dolaroj).

Lia laboro donis frukton. En 1998 Legend okupis la unuan lokon inter la samspecaj entreprenoj. En la bankedo por festi la sukceson, Yang kaj liaj helpantoj ne povis deteni sin de larmoj, rememorante la pasintecon.

Multaj amikoj diris, ke se li laborus eksterlande, li multe enspezus kaj komforte vivus. Tamen retrorigardante, li ne bedaŭras sian elektadon. Laborante por la ĉina industrio, li sentas nekompereblan fieron. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* KOMENCANTO — tre interesa internacia gazeto: pk 132, Ekaterinburg, 620041, Rusio.

\* Stanislaw Fischer, 48-j., serĉas korespondamikojn pri interŝanĝo de poŝtmarkoj kaj uzitaj telefonkartoj. Adr.: ul. Bulgarska 8/8, PL-64-100 Leszno, Pollando.

\* Declerck Pauline, 14-j. lernantino, dez. kor. tm. Adr.: 1754 Chemin du Byssaert, 59380 Guedypre, Francio.

\* Clement Michel proponas al ĉiuj esperantistaj historiistoj (amatoraj kaj profesiaj) fondi fakan

societon aŭ reton (kiun ni povus eble nomi Internacia Societo de Historio aŭ iu ajn taŭgan nomon). Bonvolu skribi al Michel Clement Ph. D. Retadreso: clementm@altavista.net aŭ clement.michel@uqam.ca. TTT-paĝo pri historio: <http://www.er.uqam.ca/nobel/k33440/premier.html>.

\* Xi'an Zhiyuan Kultura Kompanio (XZKK) volas apliki Esperanton en ĉi tiuj flankoj: internacia komercado, turismo, kultura interŝanĝo, studado de ĉina medicino, distribuado de televidaj programoj, reklamado, kunfondado de fremdlingvaj lernejoj (la angla, rusa, japana, ĉina ktp.) perado, poŝtado k.a. Adr.: S-ano Qiu Shi, CN-710068, 221-Nr.29, Huannanlu Xiduan, Xi'an, Ĉinio. T/F: 86-29-8412463; Email: taiyaanz@pub.xaonline.sn.cn.

# Fiŝista vilaĝo sur maro



Fotoj de GUO SHI

En orienta golfo ĉe Fujian-provinco, Ĉinio, bonorde staras vico kaj vico da domoj, nome Fiŝista Vilaĝo sur Maro. La tieaj 650 familioj el pli ol 2 630 anoj plejparte sin okupas pri bredado de grandaj ŝtonkapaj fiŝoj.

En 1991 fiŝistoj sinsekve venis tien por bredi grandajn ŝtonkapajn fiŝojn, kies nombro nun superis 30 mil retkestojn. Kaj krome, ili bredas ankaŭ haliotojn (*Haliotis gigantea*), epinefelojn (*Epinephelus akaara*) kaj aliajn dek specojn.


Dank' al la tieaj apartaj naturaj kondiĉoj, la areo por fiŝbredado jam atingis 700 kvadratajn kilometrojn. Nuntempe, tie bredas ne nur fiŝistoj el Fujian-provinco, sed ankaŭ nemalmultaj el Taiwan, Hongkong, Makao kaj Kanado.

Legomo-venda boat







Rikolto de fiŝoj



Familio de fiŝisto



Fiŝidojn en akvon

de WANG HANPING

**L**Aŭ invito de japana samideanino Morita Yoko, mi faris vojaĝon en Japanio pasintaŭtune. Dum unu monato mi vizitis pli ol dek urbojn kaj urbe-tojn, kie japanaj amikoj ofte demandis min kiel Japanio impresas min. Pri tiu demando simpla, tamen malfacile respondebla per kelkaj vortoj, mi ofte diris, ke la medio de Japanio estas pura kaj bela kaj japanoj gastamaj, afablaj kaj diligentaj. Tio ja estas mia plej profunda impresio pri Japanio.

### MEDIA PROTEKTO

En mia imago Japanio estis evoluinta lando, kies industriar disvolviĝon sekvis troekspluatado de riĉfontoj kaj malboniĝo de la medio. Sed kiam mi atingis Japanion, mi vidis tute alian bildon.

Unue impresis min ĝia ege pura kaj bela medio.

Sur la blua ĉielo ŝvebis blankaj

nuboj kaj en freŝa aero aromis floroj, verdis herboj kaj belis diversaj arboj. La pureco kaj agrableco regis ĉie en Japanio, ĉu sur la stratoj en Tokio ĉu sur la vojetoj de Yatugatake-monto.

Riĉfontoj relative magraj kaj grandkvante bezonataj estas granda problemo por Japanio. Kiel ĝin solvis japanoj sen detruo la ekologian medion? De japanaj esperantistoj mi informiĝis, ke Japanio bezonas grandan kvanton da ligno — japanaj loĝdomoj plejparte estas konstruitaj el ligno, tamen preskaŭ ĉiu ligno uzata en Japanio estas importita el aliaj landoj. Fakte, en Japanio prosperas arbaroj. Anstataŭ forhaki japanoj bone rezervas ilin.

Eble lerninte el la lecionoj de la homaro, japanoj donas grandan atenton al la media protekto kaj ili ĉiuj estas volontuloj de media protekto. S-ro Matumoto Ken'iti donis al mi profundan impreson tiuflanke. Iuvespere, ĉ. la

10-a, kiam ni proksimiĝis al lia hejmo, li, rimarkinte plastan sakon sur la strato, tuj iris preni ĝin kaj ĵetis ĝin en rubujon. Malgraŭ, ke li jam aĝas 90 jarojn, ĉiumatene li balaas ĉe sia domo, kelkfoje eĉ antaŭ najbara pordo, pensante, ke la falintaj arbofolioj estas de lia familio.

Eble la pejzaĝoj de Japanio ne estas kalkulataj kiel la plej belaj en la mondo, tamen ĝia bona protekto de medio kaj natura beleco kreita dank' al tio neforgeseble impresas min.

### DILIGENTAJ, SERIOZAJ KAJ AMIKAJ JAPANOJ

La japanoj, kun kiuj mi konatiĝis dum mia vojaĝo, impresis min per diligenteo. Ankaŭ la tieaj esperantistoj, kiuj iras al laboro frue en mateno kaj hejmen revenas malfrue en vespero, malofte povas manĝi kun siaj familianoj.



Por bone aranĝi mian vojaĝon en Japanio, s-ro Nagase Yoshikatsu, prezidanto de la Nagoja E-centro, multe klopodis. Preskaŭ ĉiutage li telefonis al tiu, kiu pretas gastigi min hejme. Kelkfoje li eĉ telefaksis al mi je la 2-a aŭ 3-a matene por informi min pri la aranĝo. Tio ege emociis min. Dank' al lia klopodo kaj zorgema aranĝo de diverslokaj esperantistoj de Japanio (Ili ella-



Staras en Nagoja paro da ornamaj kolonoj donacitaj de ĝia ĝemela urbo Nankino.

boris detalajn kaj ĝishore precizajn aranĝojn antaŭ mia atingo), mia vojaĝo en Japanio estis tre sukcesa. Por aranĝi mian viziton al la superlernejo Ni'pa en Kanagawa, geedzoj Shirai Yasuo, s-ro Inumaru Fu-

mio kaj s-ino Sanmonji stafete akompanis min.

La diligenteco kaj seriozeco de japanoj montriĝas ankaŭ en E-agado. Dum la 85-a Japana Kongreso de Esperanto mi konatiĝis kun

multaj diligentaj kaj sukcesplenaj esperantistoj. Ili ĉiuj, ĉu junaj ĉu maljunaj, ĉiam vigle kaj serioze partoprenis diversajn kursojn, kunsidojn kaj aliajn aktivadojn. Mi pensas, ke dank' al tiuj viglaj, diligentaj kaj seriozaj esperantistoj, la japana E-movado ĉiam prosperas kaj senĉese progresas. Kvankam la Japana Kongreso de Esperanto daŭris nur du tagojn ĉiufoje, tamen ĝi estis bone organizita kaj riĉa je programoj, kun temo serioze diskutata.

Skribante tiujn liniojn, mi rememoras du scenojn ofte videblajn dum mia vojaĝo en Japanio: japanoj emas legi, atendante trajnon kaj sidante en vagono; nemalmultaj ne haltigas siajn paŝojn eĉ sur moviĝanta eskalatoro.

Kiel ĉiuj aliaj esperantistoj en la mondo, la japanaj multe laboras por la interkompreno kaj amikeco inter diverslandaj popoloj. Por riĉigi



La aŭtoro (meze), dekano de la lingva kaj kultura fakultato de la Universitato de Nagoja (dekstre) kaj instruisto de la germana lingvo kaj Esperanto (maldekstre)

mian vojaĝon en Japanio, ili zorgeme organizis iujn aktivadojn kaj raportis ilin en lokaj ĵurnaloj por disvastigi la influon de Esperanto. En Sendai, dank' al prof. Matumoto Takasi mi vizitis la redakcion de "Kahoku Shimpo", la plej vaste legata en nordorienta Japanio, kaj estis intervjuita. En Ŝizuoka s-ro Mochizuki Masahiro kune kun lokaj esperantistoj kaj neesperantistoj organizis "Ĉinan Vesperon", kio ege kortuŝis min. En Nagoja mi vizitis oficiston de ĝia sekcio de internacia interŝanĝo. Aichi kaj Nagoja ĝemeliĝis respektive kun mia hejmprovinco Jiangsu kaj ĝia ĉefurbo Nankino.

Dum unumonata vojaĝo en Japanio kaj vivado kune kun japanaj esperantistoj, mi havis feliĉon ĝui popolajn morojn de Japanio kaj akiri multajn inspirojn. Tio ja estas neforgesebla por mi dum la tuta vivo. ■

# Impresoj pri Japanio

# Poemoj

de ŜTEFANIJA FLEGAR (Kroatio)

## La rivereto

Ofte mi promenadas  
Apud via fonto  
Mi longe pripensadas  
Pri via plua sorto.

Vian vojon akve faritan  
Trafas multe da embaraso  
Ĉar ĝi ne estas ordonita  
Kaj ĝin ordonas akva amaso.

Via bordo varbas la promenantojn  
Pro via pitoresknaturo  
Ofte tio estas interparolantoj  
Kiu ĵaŭskultas la rivermurmuron.

Mi fiksrigardis ĝian profundecon  
Pensoj miaj forvadis malproksime  
Mi forgesis je mia soleco  
Ke akvospaco flustras ondforme.

Longe mi kun tiuj pensoj restis  
Rigardante streĉis mia iriso  
Kaj mia bildo en akvo ekestis  
Kvazaŭ mi estas Narciso.

Kara rivereto mia  
Kien vi tiel urĝas  
Kie estas celo via  
Kaj kie via adreso troviĝas?

Trinkigu plue per via akvo  
Niajn ĝardenojn, kampojn kaj arbarojn  
Ĉar vi ne scias vian sekvon  
Kaj eble vi influos en la maro.

Mi salutas vin riverence  
Dezirante al vi la pacan fluon  
Kaj mi atendas paciencen  
Unu belan tagon sen pluvo.

Neatendite mi venos denove  
Ĉar mi promeni ŝatas  
Sed ofte tio estas senpove  
Kiam la nuboj kirloventas.

Vi atendu mian alvenon  
Tion mi momente ne ordonas  
Trinkigu daŭre vian ebenon  
Ĉar mi kun vi nun adiaŭas.

## La semanto

Tiu homo kiu semas  
Ne bezonas la teron  
Kaj pri grava afero temas  
Ĉar li uzas la kajeron.

Kiu estas tiu granda genio  
Ke pri li parolas tuta mondo  
Amaso ne interesas pri tio  
Sed estimas lin la intelekta rondo.

Genia semo estas dissemita  
Tra la mondo kiel komunikilo  
Kaj la sentoj estiĝis vekitaj  
Ĉe homoj soifantaj da helpilo.

Kiu do estas tiu nia semanto  
Ke li helpis al ni ekkoni nin  
Ĉar li donacis al ni la Esperanton  
Kaj ni devas laŭdi kaj festi lin.

Kara nia Doktoro Esperanto  
El tiuj vicoj ni vin rekonas  
Ĉar vi estas nia bonfaranto  
Kaj ni viaj adeptoj fieras.

Al esperantkreinto ni ŝuldas  
Grandan Dankon pro grandioza ago

Ĉar en estonteco ni kredas  
Ke venos baldaŭ pli hela tago.

Estimata kreatoro estu salutata  
Sufiĉe vi laboris sen laco  
Sur via vojo ni estas laboranta  
Dezirante al vi eternan pacon.

## La Almozulo

Granda estas mia pacienco  
Tage starante sur la strato  
Kaj dependi de indulgeco  
Ĉar je tio pelas min malsato.

pro tio mi multe suferas  
Ĉar mi vivis kiel riĉuloj  
Kaj tio min terure koleras  
Ke mi tiel aspektas en viaj okuloj.

Faris min tia kruela milito  
Deprenis mian tutan havaĵon  
Ne lasis al mi nek liton  
Por mi restis nur la humilaĵo.

Homoj preter mi pasadas  
Kaj tion neniu rimarkas  
Ke suferanto malsatadas  
Mi tamen al ili dankas.

Mirindaj estas tiuj homoj  
Kiu ne zorgas pri malriĉulo  
Ĉar ili apartenas al riĉaj domoj  
Kaj ili ne vidas la mizerulon.

Sed iam tagiĝos mia suno  
Kaj mia kampo ricevos semiĝinton  
Mi bakos la panon de propra faruno  
Kvankam mi estas kutima rifuĝinto.

## ĈINIO

● Memore al la centa datreveno de la naskiĝo de fama ĉina tradukisto Qu Qiubai (1899-1935) kaj fama ĉina verkisto Lao She (1899-1966) kaj la 120-a datreveno de la naskiĝo de Albert Einstein (1879-1955), la ĉina societo "Amikoj de Esperanto" faris Esperantajn memorkovertojn. La tri famuloj estis subtenantoj de Esperanto. (Qin Kaiji)

## DANIO

● La 20-an de majo 1999 la mondfama dana astronomo prof. d-ro Erik Hoeg de la Astronomia Observatorio de la Universitato de Kopenhago, Danio, estas honorita per la unika medalo "The Director of Science Medal", disdonita por la unua fojo kaj transdonita pere de la scienca direktoro de ESA, Roger Bonnet.

Erik Hoeg ricevis la medalon pro sia elstara satelitprojekto "Hipparcos". En la ceremonio en Bern direktoro Roeg Bonnet diris: "Tiu ĉi medalo estas donita kiel rekono de la laboro de 'Hipparcos', unu el la plej unikaj misioj en Eŭropo. Neniu alia spac-agenturo eltrovis ion similan."

Prof. d-ro Erik Hoeg estas membro de la "Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna" (ISIIL), kies prezidanto estas prof. d-ro Carlo Minnaja (matematiko), la Universitato de Padova, Italio.

(Birthe Lapenna)

## FRANCIO

● La 54-a Kongreso de SAT-Amikaro bone sukcesis, kiu oka-

Ĉeestantoj de la 54-a Kongreso de SAT-Amikaro



zis inter la 3-a kaj la 5-a de aprilo en Glay-Pays de Montbeliard. 171 personoj partoprenis. La proponitaj aktivajoj estis tre densaj kaj aprecitaj. (Henri Nusbaum)

## KOREIO

● La 31-a Korea Kongreso de Esperanto okazos en la 9-a kaj 10-a de oktobro 1999 en Seulo (Semaol trejnejo). Retpoŝto: keast@soback.kornet21.net. <http://www.esperanto.or.kr>.

(Lee Chong-yeong)

## KROATIO

● 11-a ALP-Adrio Esperanto Konferenco okazos en Medulin/Pula, Kroatio de la 30-a de septembro ĝis la 3-a de oktobro 1999. Temo de la konferenco estas: Kulturaj rajtoj de etnaj malplimultoj en la ALP-Adrio komunumo. Adreso de la organizanto: Kroata Esperanto Unuiĝo, p/a Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio, tel. 385 1/37 45 052; retadreso: hes@esperanto.nu.

(Kroata Esperantista Unuiĝo)

## NEDERLANDO

● La adreslibro de Pasporta Servo 1999 enhavas 945 adresojn en 76 landoj. Ĉiuj 945 gastigantoj, kiuj aperas en ĝi, jam ricevis sian adreslibron senpage, kaj povas senpage uzi la servon. Kiu ne estas gastiganto, sed tamen volas uzi la servon, povas aĉeti la adreslibron de sialoka libroservo aŭ ĉe la libroservo de UEA. Pasporta Servo strebas al 1 000 gastigantoj en eldono 2000. Se ankaŭ vi pretas gastigi Esperantoparolantojn kaj senpage ricevi la adreslibron 2000, aliĝu nun kiel unu el tiuj 1 000 gastigantoj. Pli da informoj pri Pasporta Servo vi trovos en la TTT-ejo (vidu sube). Tie vi ankaŭ trovos aliĝilon. La limdato estas la unua de novembro. Derk Ederveen, kompilanto de Pasporta Servo. WWW/TTT-ejo: <<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>>; retadreso: <pasporta.servo@esperanto.nu> . (Ret-info)

## POLLANDO

● En pola urbo Bydgoszcz okazis de la 1-a ĝis la 9-a de majo 1999 la 20-a Sanmarineca Universitata Studsesio, organizita de internacia asocio "Monda Turismo", Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino, "Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo" ktp., uzante kiel laborlingvon Esperanton, kun grandega sukceso kaj de aranĝoj kaj de partoprenantoj, kun ĉeesto de pli ol 150 gestudentoj kaj profesoroj el 15 landoj. La temoj de la prelegoj kaj klerigaj prezentadoj estis tre variaj, faritaj de elstaraj fakuloj de diversaj landoj. Krom la kleriga programo okazis ĉiutage artaj kaj distraj programeroj. (Augusto Casquero)

## UZBEKISTANO

● Ĉe UN en Ĝenevo la serio "UN Publikaĵoj pri Paco" ĵus aperis la nova anglalingva konsultlibro "Peace Museums Worldwide (Pacmuzeoj Tutmonde)". La libro komenciĝas per la salutmesaĝo de la asista ĝenerala sekretario de UN, ĝenerala direktoro de la UN-Oficejo en Ĝenevo s-ro Vladimir Petrovsky okaze de la 10-jariĝo de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro en Samarkando, Uzbekistano. En la koncerna artikolo de ties direktoro Anatoli Ionesov estas eksplicite emfazita la rolo de Esperanto kaj de esperantistoj por kreo de tiu ĉi muzeo. La informriĉa konsultlibro prezentas 61 pac- kaj pac-rilatajn muzeojn kaj projektojn en 16 landoj de 4 kontinentoj, i.a. ankaŭ la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno. Dezirindas, ke ankaŭ aliaj Esperanto-Muzeoj proponu sin kiel pacrilataj institucioj por la novaj eldonoj de tiu ĉi gvidlibro. Interesitoj povas senpage mendi la libron "Peace Museums Worldwide" ĉe: United Nations Publications, Office C 115, Palais des Nations, CH-1211 Geneva 10, Svislando. Fax: +41 22 917 00 27.

("Delta")

# Legomĝardenoj de rusoj

de XU QINGYU

**A**L rusoj plaĉas legomĝardenoj, kie ili kulturas kaj rikoltas legomojn, fruktojn kaj florojn kaj samtempe ĝuas la naturon.

Oni veturas al sia legomĝardeno situanta kelkdek km. for de la urbo. La legomĝardenoj de dekoj aŭ centoj da familioj estas ligitaj kaj okupas 1-2 kvadratajn kilometrojn. Oni povas posedi legomĝardenon post registriĝo kaj pago de iom da mono.

Poste oni prilaboras la teron kaj faras barilon kaj loĝejon. Rusoj tre ŝatas legomĝardenon faritan de ili mem, kiu herediĝas de generacio al generacio. Preskaŭ 60% de la urbaj familioj posedas legomĝardenojn kun irigacia sistemo, loĝejo kaj ligna saŭno.

Oni konstruas gusto-plenan domon en legomĝardeno. En la pura domo troviĝas kameno kaj bakujo. Tie oni povas ankaŭ rigardi televidon. Ofte oni veturas tien en semajnfino, laboras pli ol unu tagon, naĝas en rivero ĝuante kvietan vivon kaj revenas hejmen en dimanĉo.

En la legomĝardeno oni prilaboras kampon marte, semas maje kaj rikoltas aŭguste. Oni kulturas terpomon, kukumon, tomaton, brasikon, karoton, rafanon, kapsikon, cepon... En iuj malnovaj legomĝardenoj kreskas

fruktarboj, ekz. pomujoj, umeujoj kaj ĉerizujoj. En rikolta sezono ĉiuj familianoj laboras, eĉ petas amikojn helpi ilin, kune dividi la fruktojn kaj ĝojon.

En vintro oni ankaŭ ĝuas saŭnon en sia legomĝardeno. Oni verŝas akvon sur la randon de varmega forno. La ĉambro tuj pleniĝas de vaporo kaj la temperaturo altiĝas al 80°C. Duŝinte sin, oni kuŝas sur ligna benko kaj vipetas sian tutan korpon per popla vergo por malstreĉi la muskolojn kaj forfluigi la

ekskrementon. Kiam oni ne povas elteni la varmegon, li duŝas sin per frosta akvo. Kvankam tio estas panika kaj suferiga, tamen povas eksciti la nervojn kaj forfluigi la ekskrementon. Oni ripozas post saŭno kun plezuro.


En Rusio 60% de la legomoj venas de la legomĝardenoj. Oni konservas terpomojn kaj brasikojn en kelo, faras peklaĵon el kukumoj, marmeladojn el fragoj kaj tomatoj... Jen kial rusoj amas legomĝardenon. ■






de MIĤAIL BAJKOV (Rusio)

# Unua vort-enigmo "Provincoj kaj urboj de Ĉinio"



Tasko: Sur strioj oni skribas nomojn de ĉinaj provincoj kaj urboj. Pro tio, ke ili estas kunplektitaj, parto de literoj ne estas videbla. Kiujn nomojn vi povos legi sur strioj, se la plektaĵo estos displektata?

# Dua vort-enigmo "15 ĉefurboj"



Tasko de la vort-enigmo estas sama kiel la unua, sed sekretaj vortoj estas nomoj de ĉefurboj.

(Solvaj troveblaj en la sekvanta numero)



# KORUSO EL MIL PERSONOJ

## Fotoj de ZHAO XI

Matenon ĉiudimanĉe ĉe kiosko en Jingshan-parko en la urbocentro de Pekino estas ĥoro daŭranta du horojn. La korusanoj estas mez-aĝuloj kaj maljunuloj. Ili prezentas malnovajn kantojn kun ekscitiĝo.

La aktivado komenciĝis en 1992. Tiam estis nur dekkelkaj kantantoj, sed nun pli ol mil. Multaj, aŭdinte pri la spontanea aktivado, venis por partopreni en ĝi.

La direktanto de la ĥoro estis profesoro de la Centra Konservatorio. Post sia emeritiĝo li fariĝis instruisto de la kantantoj. Li instruas tiel serioze kiel en la konservatorio al la kantantoj kiel prononci kaj ĥore kanti, variigi muziknotojn kaj moduli tonon. Danke al lia instruado la ĥoro gustas profesie.

La kantantoj dronas en belaj memoroj kaj sentas grandan plezuron.

Dueeto





Surbendigo



La knabino allogita de kantoj



Korusanoj kolektiĝintaj ĉe la kiosko en Jingshan-parko

# Feriaj kamparanoj

de SUN AIJUN

**H**ODIAŬ nemalmultaj riĉiĝintaj urbanoj ekplanis lui privatan parcelon en antaŭurbo por sperti vivon de kamparanoj, sin okupi pri kamplaboro kaj rikolti apartan ĝojon en libera tempo.

Laŭdire, en antaŭurbo de Pekino estas granda farmejo konstruita por tiaj urbanoj. Posttagmeze de sabato, kun bona humoro, ni veturis al la farmejo.

Kun areo de pli ol 660 hektaroj, la moderna farmejo, nome Bela Vilaĝo, sidas borde de Chaobairivero nordoriente de Pekino. En ĝi staras unu post alia eŭropstilaj domoj kun koridoro, ruĝa aŭ blanka tegmento, ĉirkaŭitaj de verdaj arboj. La 500-hektaraj sunvarmejoj estas moderne ekipitaj. Vastas la hipodromo kaj glimas la lago destinita por boatado, naĝado kaj fiŝhokado.

Tie ni renkontiĝis kun s-ro Liu, kiu venis elekti domon. La mezaĝa Liu volis aĉeti idealan loĝejon por siaj gepatroj. Plejparto de la domoj en la urbo ne plaĉis al li, sed la farmejo allogis lin. "En urbo estas tro da bruoj, tio malutilas al maljunuloj," li diris. "Ĉi tie miaj gepatroj povas planti florojn en sia propra varmejo, kulturi legomojn sur la privata parcelo, fari fiŝhokadon kaj promenadon. En feriaj tagoj mi venos kune kun miaj edzino kaj infano por akompani ilin kaj samtempe ĝui la freŝan aeron kaj kamplaboran ĝojon."

S-ino Zhang ĉiam revis posedi domon kun parceloj. Nun ŝia revo realiĝis en Bela Vilaĝo. Komence ŝi estis iom maltrankvila, ke ŝi laciĝos pro kamplaboro en la farmejo, ĉar en la urbo ŝi jam multe laboris. Sed post vizito al la modernaj instalaĵoj de la varmejoj kaj komputeraĵoj manipulejoj, ŝi ne plu hezitis: "Ĉi tie estas ĉiaj ĉiutagaj necesajoj: elektro,



Urbanoj kolektantaj fruktojn en kamparo dum feriaj tagoj

gaso kaj akvoprovizado. Tiel ni ĝuas ne nur modernan vivon en la metropolo, sed ankaŭ vivon de kamparanoj, sen laciĝo pro kamplaboro. Krome, la farmejo troviĝas ne fore de mia oficejo, nek de tiu de mia edzo nek de la lernejo de nia filo. Ni bezonas nur 40-minutan aŭto-veturadon al la farmejo." S-ino Zhang kaj ŝia edzo estas tre kontentaj pri sia domo en la farmejo. Ilia filo, kiu lernas en mezlernejo, ege ĝojas kaj planas inviti siajn kunlernantojn ludi futbalon sur la verdejo de la farmejo en someraj ferioj.

Ni vizitis ankaŭ s-ron Xu, alian loĝanton en la farmejo. Pro tio, ke la tuta familio ege interesiĝas pri floro-kulturado, s-ro Xiu planas kulturi en la varmejo tulipojn, rozojn kaj kariofildiantojn. Li diris: "Estontece, ne estos malfacile donaci ĉiutage faskon da freŝaj floroj al mia edzino. Kompreneble, miaj familianoj kulturadas florojn ne nur pro romantiko; vendi freŝajn florojn alportas konsiderindan enspezon. Cetere, la farmejo respondecas pri liverado de semoj, servo de kulturado kaj aĉetado de floroj."

Farmejoj, kia Bela Vilaĝo, troviĝas ankaŭ en antaŭurbo de Ŝan-

hajo, Kantono kaj aliaj urboj. Tiaj loĝejoj vekas pli kaj pli grandan intereson ĉe la publiko. Tamen, iuj diris, ke tiuj, kiuj aĉetis loĝejon en farmejo, ne volas fariĝi vera kamparano, ili aĉetis nur idilian vivmanieron kaj maksimume estas feriaj kamparanoj.

Samtempe, multaj urbanoj venis en la kamparon ne por ripozo nek distriĝo, sed por terkulturo. En 1995 aperis en Ŝanhajo la fenomeno, ke diplomianoj el universitato forlasis sian okupon en urbo kaj venis en antaŭurbon por administri farmejon. En 1997 iu urbestro de Hubei-provinco sin eksigis por funkciigi privatan farmejon, tio faris sensacion siatempe. S-ino Qu Yaping, kiu lernis en alternejo kaj estis mastro de privata entrepreno, investis grandan privatan farmejon. Tiuj personoj sin okupas pri agrikultura produktado kun pli altaj scienco kaj teknologio. Sin okupante pri terkulturo tutjare, eble ili povas esti rigardataj kiel novtipaj kamparanoj.

Ĉu feriaj kamparanoj ĉu novtipaj kamparanoj, ili ĉiuj vivas en urboj kaj profunde sopiras pri la naturo kaj tero. ■

de ZHANG ZHE

Ĉi tiu pentraĵo figuras por ni Konfuceon (551-479 a.K.), humil-an maljunulon kun afabla mieno. Antaŭ la portreto oni facile rememoras lian instruon: "En ĉiu triopo da irantoj troviĝas mia instruisto. Mi lernas de li lernindajn kaj korektas korektendajn, komparante min kun li." Konfuceo en la pentraĵo havas en la manoj bambuan libron, kio markas la eruditecon de la granda edukisto kompetenta pri poezio kaj klasikajĵoj. La pentraĵo prenas pinon kiel la fonon, kio simbolas longvivecon, kaj tio kongruas ankaŭ al la temo de la pentraĵo.

Pentristo Yue Feng diris, ke li plej admiras la ideologion de Konfuceo, kaj tio estas la fonto de lia pentraĵo. Por pentri la figuron de Konfuceo, li multe legis historiajn librojn, vizitis la hejmlokon de Konfuceo kaj kultis en la Konfucea Templo. Ju pli li studis pri Konfuceo, des pli profundigis lia respekto, kaj li



Yue Feng

prenis sin disĉiplo de Konfuceo. Li sentis, ke la afable ridetanta Konfuceo staras tuj antaŭ li: la sanktulo en modesta vesto, ĉiam kun rigardo plena de kareso kaj afableco, aspektas kiel altastatura kaj iom diketa grandaĝulo.

"En Kvieta Valo" priskribas la ambicion de antikva literatoro. Sur la pentraĵo ni vidas, ke viro staras en profunda valo, rigardante supren al longa falakvo. Dum la verkado de tiu pentraĵo la pentristo rememoris grandan antikvan poeton Li Bai (701-762), kiu havis la grandan ambicion "helpi la popolon kaj pacigi la socion". Sed li ne estis konfidata de la kortego, kaj li komplete liberigis sin el strebo al ŝtatoficistiĝo kaj facilcore turismis al multaj pitoreskejoj. Dum la vojaĝo li verkis multajn poemojn.

Ŝajne amo al la naturo kaj sinfandiĝo kun la belaj pejzaĝoj estas komuna ŝato de la literatoroj de la antikva Ĉinio.

Yue Feng pentris ne nur famajn literatorojn en la antikva Ĉinio, sed ankaŭ la rolojn en klasikaj romanoj de la antikva Ĉinio. Li verkis pli ol 3 000 pentraĵojn por bildlibroj kaj centojn da ĉinstilaj pentraĵoj. "Jaspa Distriĝas per Birdo" estis pentrita sur la bazo de intrigo en la romano "Ruĝdoma Songo". La romano naskiĝinta en la mezo de la 18-a jarcento priskribas la dekadencan de granda feŭdisma domo kaj ama tragedio de knabino Jaspa kaj ŝia kuzo Jado. Multaj pentristoj ŝatis pentri Jaspa entombigantan florpetalojn, kiu ofte tristis en printempo kaj sentis malesperon en la amo. Sed Yue Feng ŝatis pentri Jaspa distriĝantan per birdo. Ŝajne la sceno estas gaja, sed fakte ĝi montris la solecon kaj izolecon de knabino forgesita en profunda buduaro.

La rulpentraĵo "Personoj de la Kampana Insurekcio ĉe Akvorando" estis lia grava verko en 1998. La

de Konfuceo estas el bambuo, sed ne el papero. La vestoj de Li Bai devas esti malsamaj al tiuj de la herooj de la kampana insurekcio post 300 jaroj. La bataliloj kaj luktmanieroj de ĉiuj herooj devas esti malsamaj. Tio ja postulas de la pentranto multan scion. Dum la longtempa pentrado Yue Feng kulturis en si la emon al libroligado kaj arkeologio. Kie okazas arkeologia ekspozicio, tien li certe iras por pririgardi kaj skizi cele havigi al si materialojn tuj akireblajn kaj konsulteblajn en la estonteco.

En tiuj vintroj antaŭ 30 jaroj Yue Feng pririgardis sub strata lampo la interkruciĝantaj arboj, kaj en tiuj someroj li observadis en pluveto la ondantan montaron. En la lasta jaro li rekomencis tian "lecionon". Li multe pentris arbon, monton, ĉevalojn kaj militĉarojn por sin pretigi al longa rulpentraĵo "Biografio de Konfuceo". Li diris, ke li volas malkaŝi leĝon el la pentrado kaj resumi teorion el la praktikado, memori en la kapo kaj turni ĝin en lertan teknikon. Por pentri sur Xuan-pa-

# Portreti antikvulojn

108 bravuloj sur la pentraĵo 22 metrojn longa estas roloj en la romano "Ĉe la Akvorando" priskribanta kampanan insurekcion. Yue Feng ŝatas la kavalierecajn, justamajn kaj sentimajn popolajn heroojn kaj plurfoje legis la intrigojn de ĉiuj roloj en la romano, ekstraktis iliajn plej karakterizajn pozojn kaj fiksas ilin sur papero. Oni povas diri, ke antaŭ la pentrado, la 108 bravuloj jam vivis multajn jarojn en lia koro.

Por pentri antikvajn kulturajn eminentulojn kaj rolojn en famaj verkoj, ne estas sufiĉe sole koni la personojn. La pentrantoj devas scii pri la socia medio, politiko, ekonomio, kulturo, vestaĵoj, manĝaĵoj, loĝejoj, vojaĝo kaj moroj de la epoko de la pentratoj, alie al la pentraĵoj mankos epokaj trajtoj. Ekzemple, la libro en la manoj

pero (speciala papero plej taŭga por ĉinstila pentrado) oni devas pentri senhalte, ajna halto fuŝos la pentraĵon. La arto de pekina opero akcentas, ke "por unuminuta sukcesa prezentado sur scenejo oni bezonas dekjaran ekzercadon". Same statas ankaŭ la ĉinstila pentrado.

De knabeco Yue Feng ŝatis pentri, sed antaŭ 21 jaroj li eniris en Qinghua-universitaton kaj studis pri radio. Tial li diris, ke la plej granda bedaŭro en lia vivo estas tio, ke li ne eniris en la Ĉinan Centran Belartan Instituton. Sed li ne forlasis sian hobion kaj fine sukcesis en tio kaj bone edukis la filon. Nun la filo efektivegis lian deziron kaj diplomigis el la Ĉina Centra Belarta Instituto. Li ofte pentras kune kun la patro sur la sama papero. ■



金陵十二钗

黛玉

丙子年春月 王羲之



"Jaspa Distriĝas per Birdo"



幽谷晴旅  
丁巳年春月 王羲之

Personoj de la romano "Ĉe la Akvorando"

"En Kvieta Valo"





"Konfuceo"



# Sango-donacado en Ĉinio

de XIANG HONG

**A**TENDANTE sang-eltiron apud sango-kolekta veturilo, Yu Yingshen vidas Lin Jian kun refaldita maniko: "Saluton, Lin Jian! Ni renkontiĝas de nove."

Estas la 8-a de majo, la Internacia Tago de Ruĝa Kruco, kaj s-ro Yu venas la unua por donaci sangan. Kiam li enskribiĝas, malantaŭ li formiĝas longa vico. Tie, ĉe magazeno okcidente de Chang'an-strato, estas unu el la fiksaj senpagaj sango-kolektejoj en Pekino. Antaŭ unu jaro s-ro Yu el Hebei-provinco konatiĝis tie kun policano Lin Jian. Hodiaŭ kuracistoj eltiras de ili po 400 ml. da sango, kaj ili ricevas ĉokoladon, trinkaĵon kaj medalon, kian ili akiris plurfoje antaŭe.

Tagmezon kuracistoj komencas ordigi sango-saketojn, kiuj estos ekzamenataj en hospitalo por sekura uzado. En tiu tago pli ol dek sango-kolektejoj ricevas sangan de pli ol 3 000 homoj. S-ino Wang Lin, propagandanta sango-donacado, diras al mi, ke ĉi-jare la nombro de sango-donacantoj estas trioblo de tiu de la sama periodo de 1998, kaj tiu de 1998 estas duobla kiom tiu de 1997. Iom post iom ŝanĝiĝis la koncepto pri sango-donado.

Mi samopinias kun ŝi.

Sango-donado koncernis min antaŭ 10 jaroj, kiam mi studis en altlernejo. Novaj lernantoj, kiuj trapasis korpo-ekzamenon, akiris 50 juanojn kontraŭ 200 ml. da eltirita sango kaj ruĝan sango-donan ateston, sur kiu skribiĝas "sango-donado estas via devo, sango-donado estas honorinda". Kelkaj

plendis, ke ili malfortiĝis post sango-dono. Sed mi ne sentis min malfortiĝinta. Mi memoris la malstreĉan mienon de la knabino, kiu ne taŭgis por sango-eltiron pro korpo-malpezeco.

Poste mi laboris en entrepreno, kie ĉiujare kelkaj kolegoj donis sangan kaj ricevis feriojn kaj monon rekompence, kaj la rekompenco kreskis ĉiujare. Mi iom post iom komprenis, ke sango-donado estas komplika afero en Ĉinio, ke iuj donis sangan senpage, aliaj pagite. La konduto kiel la mia estas nomata deviga sango-dono.

Oni praktikis en Ĉinio jam 20 jarojn la sistemon de deviga sango-donado, kies celo estas kuraĝigi homojn memvole doni sangan por garantii klinikan sango-uzadon kaj iom post iom alkitimigi ilin al sango-donacado. Sed multaj maltrankviliĝas pri sango-donado, influate de la malnova koncepto "homa korpo donita de gepatroj ne devas esti difektita", kaj plie la sistemo de senpaga kuracado ĝuigas preskaŭ senpagan sangotransfuzon. Kvankam sango-donacado estas porpledata ekde 1984 en Ĉinio, tamen ĝi malrapide evoluas. La sango-donado fariĝis deviga tasko de ĉiu entrepreno, kun imperativa ordono kaj senco de rekompenco. Fakte de longa tempo 60% da sango



Lin Jian denove en sango-kolektejo

venis de pagita sango-donado, 30% de deviga kaj nur 10% de senpaga.

La pagita sango-dono povis garantii nek klinikan uzadon nek sangan kvaliton, kio facile kaŭzis infektan malsanon ĉe sangotransfuzo. Ekz. ĝis 1996 20.88% de la 2 649 aidesuloj en Ĉinio infektiĝis de sangotransfuzo.

La praktikado de pli ol 80 landoj pruvis, ke nur sango-donacado garantias la sekuran klinikan sango-uzadon. La ĉina registaro provis leĝigi la sistemon de sango-donacado en la urbo Shenzhen kaj Hainan-provinco. Ekde la lasta duonjaro de 1998 la klinika sango-uzado estas cent-pocente garantiata per sango-donacado. La sukceso en Shenzhen akcelis praktikadon de la Leĝo de la Ĉina Popola Respubliko pri Sango-donacado ekde la 1-a de oktobro 1998, kies kerno estas konfirmi la sistemon de sango-donacado. Tio signifas, ke Ĉinio adiaŭas la historion de pagita sango-donado kaj realigas la celon de sango-donacado kaj senpaga sango-uzado. ■



Fotoj de LIU SIGONG  
kaj ZHANG RONGJUN

Hani-oj plejparte loĝas en la sudokcidenta parto de Yunnan-provinco kaj vivas de gren-kulturado sur montregionaj ŝtuparkampoj. En aparta vivmedio formiĝis la hani-a multkolora vesto-kulturo.

Aini-oj, kiuj vivas en la gubernio Menghai de la subprovinco Xishuangbanna, estas unu el la sep branĉoj de Hani-nacio kaj konsistigas ĉ. 8% de la hani-oj. Iliaj vestoj kaj ornamaĵoj estas tre distingiĝaj. Ili ŝatas vestojn faritajn el malhele blua ŝtofo teksita kaj tinkturita de ili mem. La viroj portas veston dekstre butonatan kun du vicoj da

grandaj arĝentaj pecoj kaj nigran turbanon surkape. La virinoj portas veston dekstre butonatan sen kolumo, mallongan jupon kaj kolieron el bidoj. Ili ŝatas ĉirkaŭvolvi la kruojn kaj vesti la kapon per kvadrata ĉapo kun malgrandaj arĝentaj pufoj kaj bidoj. La knabinoj portas ĉapon kun bidoj ĉirkaŭ la rando kaj kun franĝoj pendantaj ĉe la oreloj.

Multas la kapornamaĵoj de haniaj virinoj. En la aĝo de 17 jaroj junulino ekportas ornamaĵon post la kapo kiel signon, ke ŝi rajtas enamiĝi al junulo; junulino kun tempiaj haroj estas 18-jara kaj povas edziniĝi; la ornamaĵo volvita per nigra tolo montras, ke ŝi jam edziniĝis.



Hani-a viro en nacia vesto

## ***Distingiĝaj vestoj de hani-oj***






Hani-a knabino



Dum paŭzo de kamplaboro




Virinoj lertaj en brodado





Ŝi tordas fadenojn irante.



Kapornamo de virino



Hani-aj knabinoj

# Lando de longvivuloj

Teksto de PANG NAIYING  
Fotoj de HAN HONG

**L**A provinco Sichuan, kutime nomata “Ĉiela Regno”, estas lando de longvivuloj, ĉar tie vivas 990 centjaruloj, nome dekono de la centjaruloj de la tuta lando. Kaj en Pengshan en okcidenta Sichuan vivas tre multaj centjaruloj. La antikva urbeto Jiangkou estas lulilo de la kulturo de longvivado de Ĉinio.

## VIVLONGIGA METODO POSTLASITA DE PRAA LONGVIVULO

Antaŭ 2 000 jaroj tie estis la plej prospera haveno kun multaj tetrinkejoj. En tago sur la rivero navetis ŝipoj, kaj en nokto la rivero estis hele prilumita de ŝiplampoj. La ĉirkaŭaj montodeklivoj estis kovritaj de maturiĝintaj oranĝoj kaj mandarinoj. La apudrivera urbeto estis saturita de te-aromo.

La ĉefa strato en la urbeto kun longeco de 2 500 metroj estas krampita de du vicoj da palafitoj. La trinkejoj sub maljunaj banjanoj estas plenaj de tetrinkantoj. Loĝantoj de Sichuan ŝatas tian vivon: tetrinkado, ŝakludo kaj babilado.

Mi trapasis longan vojon el 999 ŝtupoj kaj ascendis la Feinan Monton. Grupo da homoj estis sin ekzercantaj per *ĉigong*-o (profundspira ekzercado). Grandaĝulo diris al mi, ke oni devas esti libera de ĉia penso kaj fari profundspiran ekzercadon por kuraci malsanojn. Antaŭe liaj stomako kaj intestoj ne bone funkciis kaj kaŭzis debilecon. Post plurjara ekzercado per profunda spirado li resaniĝis kaj iris sur monto kiel sur ebenejo. Vojgvidisto diris al mi, ke sin ekzercante dekojn da sekundoj en tiu loko, oni povas baldaŭ eniri en la plej bonan staton de la ekzercado. Sed poŝtelefono ne funkcias tie. La fenomeno interesis specialistojn, kaj ili esploris la lokon kaj trovis, ke la Feina Monto estas

loko kun intensa magneta kampo. Kaj ĝuste sur tiu monto estis la kulturejo de Peng Zu, praa longvivulo, kaj la profundspira ekzercado estis lia kreaĵo.

Peng Zu vivis antaŭ 3 000 jaroj. Legendo diras, ke li vivis 800 jarojn, sed fakte 138 jarojn. Lia vivlongiga metodo estas introvertita, milda kaj nekonkura, sed pozitiva. Tiu metodo povas “kuraci kaj preventi malsanojn”, kaj kuracistoj post li opiniis unuvoĉe: “Korpon ekzercu, sed ne tro lacigu.”

La korpo-saniga metodo de Peng Zu estas enhavoriĉa. Iu viro demandis lin pri vivlongiga metodo, kaj ĉi tiu respondis: “Estu sobra en gea vivo.” Li opiniis ankaŭ, ke asketismo detruas la sangan cirkuladon, tamen plenĉambro da virinoj certe elĉerpos la viron; “gea vivo povas kaj mortigi homon kaj naski novan vivon”. Se oni sobre ĝuas la gean vivon, la partneroj povas sanigi unu la alian kaj longigi la vivon.

La diroj de Peng Zu estis notitaj de posteuloj en la libro “Resumo de Peng Zu” kaj sur slipoj en Han-dinastia tombo ĉe Mawangdui, Hubei-provinco. En parto de la pli ol 5 000 surrokaj tomboj de la Orienta Handinastio (25-220) ĉe Jiangkou apud la rivero oni trovis ŝtonajn skulptaĵojn kaj gravuritajn brikojn kun bildoj pri amoro. Tio esprimis la deziron de la antikvuloj pri la harmonia gea vivo.

Krome la longvivulo Peng Zu akcentis sanigon per tonika dieto. Li povis fari bongustan fazanan supon, ŝatis manĝi longanon kaj trinki teon el freŝaj tefolioj. Li kuracis malsanulojn per drogherboj. Li aten-

tigis la homojn, ke troa zorgo, troa ekstazo kaj troa ĉagreno damaĝas la sanon, ke oni devas esti apatia kontraŭ ĉia ĉagrena afero. Li vivis ermite en profunda montaro, “komplete sin liberigis de ĉaso de honoro, vivis malluksan vivon kaj estis ĉiam kontenta”.

Li estis entombigita sur la Feina Monto. Oni konstruis templon por memori lin. En la tria tago de la tria monato laŭ la luna kalendaro, la templo estas plenplena de kultantoj.

## LABOREMAJ HOMOJ ESTAS SANAJ KAJ LONGVIVAJ

Grimpadi sur monton, viziti firon kaj poste manĝi bovlon da toŭfuon, sin bani en la rivero, plekti herbajn ĉapelojn aŭ vendi oranĝojn sidante en hamako en arbaro — jen la vivo ŝatata de la grandaĝuloj de Pengshan.

Foje mi preterpasis la mandarinan ĝardenon de Yuan Shaoqing kaj vidis lin sarkanta. Li jam estis 88-jara, sed neniam forlasis laboron. Li diris al mi, ke antaŭ kelke da jaroj li ankoraŭ povis plugi, prikli kaj falĉi. Sed la filino poste ne lasis lin fari tiujn laborojn kaj li sin okupis per kolektado de morusfolioj por bredi

Strato en la urbeto



silkraŭpojn. Parolante pri manĝado, li diris kun rideto: "Mi manĝas tre simple. Mi ŝatas brasikon, rafanon kaj magran viandon. Ĉe ĉiu manĝo mi trinkas iom da tonika vino. Mi trinkas nur akvon el la antikva puto de Peng Zu kaj trinkas teon el tefolioj kolektitaj sur la Feina Monto."

Ankaŭ la 105-jara maljunulino Lai estas laborema. Ŝi ellitiĝas en frua mateno, kolektas herbojn, preparas matenmanĝon, balaas la korton kaj nutras kokojn kaj porkojn. Post matenmanĝo ŝi eliras el la malnova domo en bambuaro kaj promenas sur kampo. Se ŝi ne havas kamlaboron, ŝi flikas vestojn, garbigas la kolektitajn branĉojn kaj bonorde stakigas ilin sub la alero.

La 110-jara maljunulo Xie Hongxing estas la plej aĝa longvivulo. Li blindiĝis en la aĝo de 3 jaroj. Antaŭ 50 jaroj li migradis lukrante per amuzajoj. Sed li neniam falis en pesimismon kaj migris ĉiam kantante. Li ofte helpis pli malriĉajn homojn per mono akirita tre malfacile. Dum sia migrado li akceptis 3 senhejmajn mizerulojn, kaj el ili ankaŭ mezaĝa virino kaj junulo estas blinduloj. La kvar malfeliĉuloj helpis unu alian kaj fariĝis samfamilianoj. La mezaĝa blindulino fariĝis lia edzino, kaj la du junaj fariĝis iliaj filo kaj bofilino. Nun la bofilino jam fariĝis avino, sed ŝi ankoraŭ tutkore prizorgas la tri blindajn samfamilianojn sen ajna plendo. Ŝi diris, ke humaneco faras la familion harmo-

nia kaj feliĉa. Ofte la tuta familio sidas en rondo por aŭskulti radiodisendon. Se ili aŭdas ion interesan el la radio, ili adaptas la interesajn al kanto kaj la tuta familio dronas en gajeco.

## BONA TRADICIO DE RESPEKTO AL MALJUNULOJ

La loĝantoj de Pengshan tre respektas kaj prizorgas maljunulojn esperante, ke ili, spertintaj multajn suferojn dum la vivo, ĝuos feliĉan familian vivon. Tio ja estas la tradicio de la loko. La bona filo kaj lojala kortegano Li Mi (224-287), tre fama en la historio de Ĉinio, ja devenis de Pengshan.

En sia infaneco Li Mi perdis la gepatrojn kaj estis vivtenata de la avino. La kortego plurfoje intencis nomumi lin, sed li skribis peticion por fordanki: "Mi aĝas 44 jarojn, kaj la avino 96 jarojn. Mi havos multajn jarojn por servi al via imperiestra moŝto, sed ne multaj restos la tagoj por mi danki la avinon pro ŝia vivtenado. Mi petegas, ke vi permesu al mi resti ĉe la avino por akompani ŝin ĝis ŝia lasta momento." La imperiestro konsentis kun li, kaj ĉi tiu akceptis la nomumon de la kortego post la forpaso de la avino. Li multe kontribuis sur sia posteno.

La loĝantoj de Pengshan prenas Li Mi kiel ekzemplon kaj tre amas kaj respektas maljunulojn. Ĉiuj seninfanaj maljunuloj kaj vidvoj estas bone prizorgataj.

S-ino Wang Shuqiong estas direktoro de maljunulejo. Ŝi dediĉis 40 jarojn al flegado de maljunuloj. Ŝi jam emeritiĝis, sed ŝi ne volas forlasi la maljunulejon por helpi la novajn servistojn en laboro.

Ŝi diris al ili, ke maljunuloj timas




Maljunaj fratinoj

malvarmon. En printempo ili devas helpi la maljunulojn iri sub la sunon por sin sunumi, kaj en vintro ili devas hejti la ĉambrojn kaj varmigi la litaĵojn de la maljunuloj. Ŝi ofte petis siajn parencojn porti el Tibeto buteron, miksita ĝin kun sezamo, sojfabo, gisto, ginsengo kaj mielo kaj faris el ili bongustan tonikaĵon por la maljunuloj.

Oni diras, ke maljunuloj facile naiviĝas. La 112-jara maljunulino Deng havas ruĝajn vangojn. Ŝi estas gaja, parolema kaj ridema. Sed la samaĝa maljunulino Shuai estas alispeca "infano". Se la direktorino disdonis manĝaĵojn unue al aliaj, ŝi koleris: "Ĉu vi ne lasas min manĝi?" Wang Shuqiong tuj korektis sin kaj ĉiam servis al ŝi unue. Poste Shuai, altastatura kaj dika, devis ĉiam kuŝi en la lito pro maloportuna aĝo, kaj la maldika Wang Shuqiong plurfoje turnis ŝin ĉiutage sur la lito, ofte lavis ŝin, ŝanĝis por ŝi la vestojn kaj manĝigis al ŝi manĝaĵojn kaj medikamentojn. Ĉe sia lasta spiro Shuai firme premis la manojn de Wang kaj diris: "Vi estas tre bona. Mi tre dankas vin."

Seninfanaj maljunuloj tre zorgas pri sia sepultado. Wang Shuqiong do kudris por ĉiu maljunulo kompletan da novaj vestoj por sepultado kaj pakis ilin per ruĝa ŝtofo. Ŝi volis, ke la maljunuloj estu trankvilaj pri tio.

En la hejmloko de Li Mi la maljunuloj povas viziti la Maljunulan Universitaton por lerni ĉigongon, gastronomion, kaligrafion kaj pentradon. Ĉiuj centjaruloj ricevas de la registaro grandan torton en sia naskiĝtago kaj akurate ricevas centjarulan subvencion. En la longvivula tago ĉiuj longvivuloj estas invitetaj al festeno. ■





La 105-jara Lai Xuehua



En la vilaĝa amuzejo por maljunuloj




Sekigado de kolbasoj



La mastrino kun siaj bebo kaj bopatrino



La 102-jara Xie Zhanyun kaligrafas  
ĉiutage.



La urbeto Jiangkou

# “Maro” kaj templo sur altebenaĵo

Teksto kaj fotoj de  
CHENG WEIDONG

**E**BLE pro manko de akvo sur la altebenaĵo, loĝantoj de Diqing-altebenaĵo ŝatas nomi tieajn lagojn kaj akvejojn “maroj”. Bita en la rezervejo Bitahai, 25 kilometrojn oriente de la gubernia urbo Zhongdian ja estas tia “maro”. Antaŭ nelonge mi vizitis la rezervejon, kiu bone konservas sian naturan primitivecon.

## RAJDI EN BITA-MARON

Pro tio, ke aŭtoj estas malpermesataj eniri la arbaron, do mi devis rajdi sur ĉevalo por daŭrigi nian vojaĝon, kion mi ja tre volis provi. Ĉe unu-trunka ponto atendis klientojn dekkelkaj tibetaj junuloj kun ĉevaloj, kaj por ira-reira ĉevalrajdo ili postulis de ĉiu turisto 60 juanojn. La ĉiĉerono elektis por mi blankan ĉevalon mildan sed fortan, ĉar mia 85-kg-a korpopezo kaj 15-kg-a pakaĵo el fotoaparatoj estis tro pezaj por malfortaj ĉevaloj. Sur la selo estis dika pelto.

Nia karavano malrapide antaŭeniris, jen grimpis monteton, jen transiris rivereton, jen trapasis marĉon. Dika tavolo da falfolioj susuris sub la piedoj. Apud la vojo kuŝis velkaj arboj, iuj jam putris. Densaj kaj ombraj abioj kaj piceoj estis la ĉefaj specoj en la arbaro. Ankaŭ kverkoj, betuloj kaj pinoj prosperis. Ni ĉiuj estis ĝojaj, kan-

toj kaj trotado eĥis en la arbaro. Ni jam eniris en profundan arbaron. Mi per la du manoj flankenpuŝis la branĉetojn barantajn nian vojon. Ankaŭ mia ĉevalo ne estis tiel obeema, kaj ĉevalrajdo por mi ne estis ĝuo. Fine mi falis de la ĉevalo, kiam ĝi transpasis sulkon. Por sekuro mi do piediris kvankam iom laca. Post tri-hora marŝo de 7 kilometroj Bit-



La aŭtoro kaj bonzo

maro aperis en mia vido.

## RAKONTO PRI EBRIIGO DE FIŜOJ

Bitamaro estas kvazaŭ smeraldo inkrustita en la arbaro. La ĉiĉerono sciigis al mi, ke la rezervejo areo 1 418 hektarojn, kaj la lago — 159 hektarojn, ĝi estas la centro de la rezervejo. “Bita” en la tibeta lingvo signifas densan kverkaron. Vere sur deklivoj de la montoj ĉirkaŭ la lago prosperis densa kverkaro. En la arbaro ankaŭ rododendroj etendis siajn

branĉojn, kvankam jam pasis la sezono de florado, tamen floroj ruĝaj, rozaj, flavaj ankoraŭ disvolviĝis en folioj. Laŭdire en la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro, kiam la rododendroj floras, fiŝoj en la lago englutas la falintajn petalojn. Sed la floroj estas iom venenaj, do la fiŝoj manĝintaj la petalojn flosas sur akvo kiel

ebriaj. Tio estas interesa fenomeno de Bitamaro. Laboranto de la rezervejo diris, ke en la arbaro vivas multaj animaloj, kiaj resuso, linko, tibeta fazano, tibeta oĉotono (*Ochotona*), papago kaj turdo... Tre bedaŭrinde, ke ni ne havis ŝancon vidi tiujn vivaĵojn propraokule, nur sciuroj vidiĝis, kaj kantoj de turdoj aŭdiĝis.

En la vespero mi tranoktis en ligna neelektrizita dometo ĉe lago.

Manĝoj kaj legomoj estis aĉetitaj el urbo. Ĉe vespermanĝo, la montoj jam ŝirmis la lagon de la sunbrilo. Post la manĝo, jam tute malheliĝis, ni babilis en kandel-lumo. Kiam ni enlitiĝis, ekventis kaj arbobranĉoj fajfadis. Aŭdiĝis plaŭdo de akvo en la lago, kaj la temperaturo abrupte malleviĝis. Mi kuntiriĝis sub la dika litkovrilo, kaj perdis la antaŭan romantikon pri la “maro”.

Frumatene de la sekva tago mi frue ellitiĝis por spekti matenan belecon de la loko. Mi volvis la kapon per tuko kaj eldomiĝis. Nebulo ŝvebis en la arbaro, en la lago



senzorge ludis kelkaj vaneloj, kaj la lagakvo trembrilis sub la leviganta suno. Nuboj naĝis sur la safira ĉielo, mi promenis sur herbejo tegita de blanka prujno kaj roso kaj fotis la pejzaĝon tute forgesante la malvarmon en la nokto.

## “MARO” KAJ TEMPLO

“Maro” kaj templo estas tute malsamaj vidaĵoj, tamen ili harmonie aranĝitas en la sama pejzaĝo. Kiam mi staris antaŭ ili, mi sentis ian supernaturan forton, forton ekster historia, kultura kaj religia pejzaĝo. Por tiu loko ili estas nemankigeblaj.

Ĉe la lago Napa-hai en Diqing ni vidis templon nomatan Gadan Songzanlin, kiu estis konstruita pro tio, ke en aŭgurado Dalai-lamao la Kvina akiris de dio sugeston:

“En arbaro lirlas fonto, sur akvo ludas akvobirdoj.” Do en la jaro 1679 li konstruis la templon kaj donis al ĝi la nomon Gadan Songzanlin. Rigardate de malproksime la templo estas tiel grandioza, ke la lokanoj nomas ĝin Potala-palaco la Dua.

La halo de la templo estas tre pompa, en ĝi pendas longaj sutro-




Rododendroj

flagoj, kolorriĉaj freskoj plenigis la murojn, lamaoj en ruĝaj kasaĵoj litiis, kaj kultantoj staris genue preĝante. Sur la kultotablo brilantaj buterlampoj misterigis la ĉambron, kun respekto mi prezentis al la abato kaj viva budho blankajn silkajn rubandojn, kaj fotojn de Benĉen Erdini la Deka


faritaj de mi. Kiam ili sciis ke mi pli ol dek fojojn vizitis Tibeton, ili tuj reciprokis al mi blankan silkan rubandon, kondukis min al ĉambroj kaj regalis min per teo. Vizitantoj kaj religiuloj laŭvice preĝis kaj petis vertotuŝon de abato. Ankaŭ mi benas ilin en mia koro. ■



Viva budho Buzhu, abato de la templo Gandan Songzanlin



Paŝtejo ĉe "maro"





Lama-o recitanta sutron



Nigrakolaj grupoj vivantaj ĉe "maro"




La rezervejo Bitahaj

# DE SCHLAPPNER AL HOUGHTON (I)

*Malsukcesinte en plurjara provado partopreni en la mondpokala piedpilka konkurso, la ĉina teamo invitis en 1992 germanon Schlappner kiel sian ĉeftrejniston. Post 2 jaroj Ĉinio komencis lig-matĉojn de profesiaj piedpilka kluboj, kaj la eks-Sovetunia trejnisto Sergej fariĝis la unua alilanda trejnisto de ĉina klubo. Poste pli ol 20 alilandaj trejnistoj laboris en Ĉinio. Ili alportis avangardajn teorion kaj teknikojn al la ĉina piedpilkado. Pro siaj sukcesoj kaj individua karaktero ili estis aŭ laŭditaj aŭ kritikitaj de ĉinoj. En tiu ĉi artikolo la aŭtoro rakontas pri iuj el ili.*

La Red.



Schlappner


de XIANG HONG

**P**OR la ĉinoj estas eble malĝojo konfesi la postĝintekon de sia piedpilkado. Ĝis la komenco de la 90-aj jaroj Ĉinio neniam eniris en la finajn matĉojn de la mondpokala piedpilkado, kio malesperigis la ĉinajn piedpilkaĵojn. Ĉu la ĉina teamo volas eksterlandan trejniston? Post pripensado la Ĉina Piedpilka Federacio elektis germanon Schlappner ĉeftrejnisto de la ĉina piedpilka teamo. Tiam en la okuloj de la ĉinaj maniuloj tiu germano, kiu faris grandan kontribuon al Germanio, estis heroo, kiu povas liberigi la ĉinan piedpilkadon el la postĝinteco.

Hodiaŭ ni ankoraŭ povas diri, ke Schlappner kiel eksterlanda piedpilka trejnisto estas plej amata de la ĉinoj. Li ja havas grandan honoron en la piedpilka rondo. Li plurfoje montris sin en la vespero de la gravaj ĉinaj festoj. Konsciinte la grandan esperon de la ĉinaj piedpilkaĵoj, tiu ekscitigema germano ĵuris, ke li nepre sukcesigos la ĉinan teamon eniri mondpokalan konkurson.

Kompreneble la germana teorio pri piedpilkado estas firme enradikiĝinta en la kapo de Schlappner. Por venko oni povas mal-

havi genian ŝotiston, sed estas nemankigeblaj la severa disciplino, kolektiva ambicio kaj granda fizika forto. Tial jam ĉe sia eklaboro en Ĉinio li emfazis la gravecon de la kolektiva ambicio kaj intensigis la trejnadon. Ĉio ĉi ja estas farenda por la trejnistoj kaj en mallonga periodo estas malfacile videbla la efiko, tamen Schlappner konsumis grandan energion pro sia kutima fervoro kaj diligenteo. Eble Schlappner ne bone konis la netaŭrecon de la konkursoj kaj psikologia stato de la ĉina



Schlappner en trejnado

teamo, tial li malkonvene pruvigis siajn artifikojn en la venko super malfortaj teamoj kaj en la venko gajnita en amikeca konkurso. Fakte la ĉina teamo neniam formis sian propran ludmanieron, tial ĝi ne povis korekte efektivi la ideon de la trejnisto sur la nesondebla ludkampo. Kaj plej grave estis, ke la malforteco de la psikologia stato de la ĉinaj piedpilkistoj multe superis la imagipovon de Schlappner.

Oni devas diri, ke estas multaj problemoj por la ĉina teamo, sed Schlappner faris nur unu el ili, t.e. plifortigi la fizikan staton de la piedpilkistoj. Siatempe, kiam Schlappner diris, ke al la ĉinaj piedpilkistoj mankas kolektiva ambicio, multaj piedpilkaj maniuloj estis surprizitaj de liaj vortoj kaj montris nekomprenon. Tamen kun la disvolviĝo de ligmatĉoj de la profesiaj kluboj kaj la ĉiam pli klara evidentiĝo de la mankoj de la ĉinaj piedpilkistoj, oni nature konfesis, ke Schlappner diris trafe. Eĉ hodiaŭ, kiam Ĉinio faris la ligmatĉojn 5 jarojn, la profesia kvalito de ĉinaj pied-

pilkistoj estas ankoraŭ malalta. Nun la ĉinoj jam konas, ke kiu ajn gvidus la ĉinan piedpilkon teamon siatempe, li ne sukcesus puŝi la ĉinan teamon en la finajn matĉojn de la mondopokala piedpilka konkurso. Kaj por Schlappner la malgranda urbo Irbid en Jordanio fariĝis lia Vaterlo — En 1993 la kvalifika konkurso de la azia regiono por la 13-a Mondopokala Piedpilka Konkurso okazis en Irbid, kie la ĉina teamo malsukcesis, kaj en la memoro de la ĉinaj piedpilkaj maniuloj gravuriĝis plia urbonomo — Irbid.

Schlappner ne senkulpigis sin. Li volis fari ĉion denove kaj fari ion utilan por la lando ĉagrenita pro sia piedpilkado. Kvankam li ne povis fari plu sur la posteno de ĉeftrejnisto por la ĉina piedpilka teamo. Poste li laboris kiel trejnisto de iu kluba teamo kaj fine revenis en Germanion. Dum tiu periodo li senrezerve inicis la modernan piedpilkon teorion al siaj ĉinaj kolegoj kaj rekomendis iujn elstarajn ĉinajn piedpilkistojn al germana teamo.

Dank' al lia ripetfoja emfazo

la Ĉina Piedpilka Federacio finfine decidis alpreni taŭgajn metodojn por levi la fizikan forton de siaj piedpilkistoj. En la pasintaj 5 jaroj ĉiuj piedpilkistoj devis trapasi la ekzamenon de fizika forto por la piedpilkaj konkursoj de kategorio A. Kiam liaj daŭrigantoj trovis, ke la ĉinaj piedpilkistoj energie kuris sur la ludkampo, ili eble rememoris lian nomon.

Nun la ĉinaj piedpilkaj maniuloj povas kun facila koro rememori la maljunan germanon de la hejmloko de biero. Nun en Ĉinio estas biero kun marko Schlappner, kaj oni trinkante la bieron babilas pri piedpilkado, dume Schlappner rigardas Ĉinion ne sole en la kadro de piedpilkado. Li diris, ke tio estas lia amo al Ĉinio. Koncerne la sukcesojn sur la piedpilka ludkampo, la liaj kompreneble ne estas plej bonaj, tamen la ĉinoj ankoraŭ memoras lin kaj lia nomo de tempo al tempo aperas en ĉinaj gazetoj kaj ĵurnaloj. En iu televida filmo oni vidas, ke li en ĉasista jako ĉasas kun siaj germanaj amikoj. ■

# Antikvuloj kaj floroj

de WANG YONG

**E**N la fino de la 19-a jarcento eŭropano E. H. Wilson 5-foje vizitis Ĉinion kaj pasigis 18 jarojn ĉi tie por kolekti sovaĝajn kaj kulturatajn florojn. Poste li transdonis la semojn kaj bulbojn de pli ol 1 200 specoj da vegetaloj, kiujn li kolektis en Ĉinio, al Harvard-universitato, ke ĝi reproduktu kaj kulturu ilin. Poste tiuj vegetaloj disportiĝis al multaj lokoj de la mondo. Pro tio li verkis "Ĉinio, Patrino de Hortikulturo". En la libro li skribis, ke en ĉiuj ĝardenoj de Usono kaj Eŭropo troviĝas senescepte tipaj vegetaloj el Ĉinio, la plej elitaj el arboj, arbedoj, herboj kaj lianoj...

## LONGA HISTORIO DE FLORKULTURADO

La opinio de E. H. Wilson, ke Ĉinio estas la patrino de hortikulturo, montris, ke li bone konis la florkulturadon de la mondo kaj Ĉinio. En la mondo troviĝas 270 000 specoj da florantaj vegetaloj, kaj en Ĉinio oni povas trovi dekonon de la nombro. Kaj krome la historio de florkulturado de Ĉinio estas tre longa. En la skribaĵoj sur la testudaj ŝeloj kaj bovaj skapoloj antaŭ 3 000-3 700 jaroj oni povas trovi la ideogramojn signifantajn "ĝardenon", "arbaron", "arbon", "floron", "fruktan" k.s. En la ruino de Hemudukulturo en Zhejiang-provinco en orienta Ĉinio arkeologoj trovis preskaŭ sendifektajn fosiliojn de rizo, floro, lotusaj poleno kaj semo. En alia loko arkeologoj trovis inter la elfositaj historiaj restaĵoj kolorajn flolvazojn antaŭ 4 500 jaroj...

En la Okcidenta Zhou-dinastio

(11-7-a jc. a.K.) la kortego "instaligis ĝardenistojn por kulturi arbojn kaj florojn kaj breddojn kaj insektojn", kaj tio jam estis enlistigita en ŝtatan kodon.

En la 138-a jaro a.K., kiam imperiestro Wudi de Han-dinastio konstruigis ĝardenon, li ordonis konstrui ankaŭ kultivejon por pli ol 3 000 specojn da vegetaloj enkondukitaj el la sudo, ekzemple osmanto (*Osmanthus*), longano (*Euphoria longan*), liĉio, areko, olivo, oranĝo kaj similaj valoraj floroj kaj fruktarboj. Tio ja estis la plej granda, unua ĉina eksperimento por kulturi sudajn vegetalojn en la nordo.

Ekde la 3-a jarcento de tempo al tempo aperis libroj pri florkulturado. Agronomo Jia Sixie de la Norda Wei-dinastio (386-534) konigis en sia verko kulturmetodojn de multaj vegetaloj. Ekzemple li tiel skribis, ke antaŭ semado de soforosemoj oni devas unue trempadi la semojn en akvo kaj poste dissemi ilin kune kun jutaj semoj, por ke soforoj kresku rekte. La metodo de intervica semado estas aplikata ankaŭ hodiaŭ.

De la 6-a ĝis la 13-a jarcento multe prosperis florkulturado en Ĉinio. Senĉese altiĝis la nivelo de ĝardena arkitekturo de kortego kaj privatuloj, kaj florkulturo jam fariĝis ĝenerala hobbio. "Literaturo pri floroj" personigis tradicie ŝatatajn florojn kaj donis al ili simolan signifon, kaj rezulte de tio la floroj akiris pli kaj pli vastan ŝaton. Dank' al pli kaj pli ofta internacia kontaktiĝo, en la 5-a jarcento lotuso enkondukiĝis en Koreion kaj poste umeo, krizantemo, peonio kaj herbopeonio enkondukiĝis en Japanion.

Antaŭ ĉ. 360 jaroj aperis en Ĉinio

por-komerca florkulturado kaj florfairoj. Pli kaj pli multiĝis profesuloj de florkulturado. Ĉiumatene florkulturistoj en antaŭurbo de Pekino iris en la urbon por kolporti florojn. La florkulturistoj de Zhangzhou de Fujian-provinco komercis ĉefe pri narciso. Foje ŝipo kun narcisaj bulboj renversiĝis en ŝtormo kaj la bulboj de narciso floris ĝis Congming-insulo en la enfluejo de Yangzi-rivero. Insulanoj ilin elakvigis kaj kulturis. De tiam la insulo ekhavis narcison de Zhangzhou.

## PRAKTIKA UZADO DE FLOROJ

Pratempe floroj estis sovaĝaj. Poste, kune kun evoluo de agrikulturo, floroj estis kulturataj de la popolo por praktika utiligado. Ni ekzemplu per lotuso. Antaŭ 7 000 jaroj homoj jam komencis kulturi lotuson pro la manĝebleco de ĝiaj rizomo kaj semo. En la akvoriĉa suda Ĉinio oni kulturis lotuson en lagoj kaj basenoj, kaj el tio devenis la rilataj partoj de la gastronomio kaj ĉina medicino. En la 8-a tago de la lasta monato laŭ la luna kalendaro, por celebri riĉan rikolton, ĉinoj kutimas kuiru kaĉon el lotussemo, arakido, azukio, radiato (*Phaseolus radiatus*), rizo, milio, sojfabo kaj maizo. Doktoroj de la ĉina medicino opinias, ke lotussemo utilas al lieno, kaj la amara plumulo de lotussemo estas efika al kuraco de febro.

Antaŭ pli ol 3 000 jaroj ĉinoj jam ekkulturis krizantemon. "Multaj en Shu-regno kulturas krizantemon. Ili prenas la ĝermojn de krizantemo kiel legomon kaj la floran kiel medikamenton. La antaŭurba-

noj kolektas sovaĝajn krizantemajn florojn por vendi al apoteko.” En antikva medicina libro oni notis: “Longtempa manĝado de krizantemaj floroj utilas al la sanga cirkulado, vigligi la korpon, malfruigi seniliĝon kaj longigi vivdaŭron.” Kaj de antaŭ pli ol 2 000 jaroj ĉinoj havas la kutimon fari krizanteman vinon. Kiam disvolviĝis krizantemaj floroj, oni kolektis iliajn foliojn kaj tigojn, miksis ilin kun milio kaj fermentigis ilin, kaj en la 9-a de la 9-a monato de la venonta jaro pretiĝos la vino... Kaj en tiu tago oni alligis al la talio kornusajn branĉojn kaj trinkis krizanteman vinon sur monto, kredante, ke tiamaniere ili povos gardi sin kontraŭ malbono kaj longigi la vivon. Poste krizantema vino aperis en imperiestra palaco kaj estis nomata “vivlongiga vino”. Nun krizantema vino kaj krizantema teo ankoraŭ estas preferataj de la popolo.

Floroj estas uzataj ankaŭ en kosmetikado krom en manĝado kaj kuraco. Virinoj de han-nacio ŝatis ruĝigi siajn ungojn per suko de balzamina floro; la ujuguraj beligis siajn brovojn per ia herbo; kaj la Hui’an-aj en Fujian-provinco ornamis siajn harojn per diversaj sovaĝaj floroj. La ĉinoj emas priskribi belajn virinojn metafore, ekzemple “bela kiel floro”, “bela kiel floro kaj juvelo”, “bela kiel persika floro”...

## LITERATOROJ KAJ “NOBLULOJ EL FLOROJ”

Antikvaj literatoroj amis florojn, kaj iuj montris grandan maniecon. Ili kulturis florojn por memkulturigi kaj sin plezurigi. Ili amis lotuson pro tio, ke ĝi elkreskas el ŝlimo, sed neniom malpurigita de tio. Kiam ili malprosperis en sia kariero aŭ vivo, ili ofte komparis sin kun lotuso por esprimi sian virtecon kaj malflatemon al malvirtaj oficistoj.

Patriota poeto Qu Yuan (340-278 a.K.) estis kortegano de Chu-regno. Dum la regperiodo de regnestro Huaiwang, li proponegis popularigi leĝojn kontraŭ la putraj politikoj, promocii virtulojn, sin alianci kun najbaraj regnoj por rezisti kontraŭ agreso, sed li estis degradita kaj ekzilita pro kalumnio de kolegoj. Li

do verkis poemojn, en kiuj li komparis sin kun noblaj arkideo kaj krizantemo kaj indigne riproĉis la aristokratojn kalumniantajn fidelajn korteganojn. Poste lia patrolando estis konkerita de Qin-regno, kaj li sin dro-nigis en rivero pro malesperiĝo.

Tao Yuanming (365-427), poeto de la Orienta Jin-dinastio, estis apatia al rango kaj amis la naturon. Li abdikis la oficon kaj ermite vivis en kamparo. Li sin distris per kulturado de krizantemo kaj verkis poemojn. Multaj versoj el liaj poemoj cirkulas en la nuna tempo. Poeto Lin Bu (967-1028) de Song-dinastio karakteriziĝis per flegmo kaj paseismo. Li restis dum la vivo senranga kaj senedzina. Li vivis en Gushan-monto en pitoreska Hangzhou kaj sin okupis pri kulturado de umeo kaj bredado de gruoj, kaj oni diris, ke li prenis umeon kiel edzinon kaj gruojn kiel filojn.

Orkideo kreskas en kvieta valo, krizantemo floras post velkiĝo de ĉiuj aliaj floroj, umeo aromas en frosta vintro. Ili estis nomataj “nobluloj el floroj”. Sennombraj literatoroj verkis poemojn, pentraĵojn kaj librojn kun tiuj tri floroj kiel la temo.

Literatoroj komparas florojn ne nur por virtoj, sed ankaŭ por amo. Li Qingzhao (1084-1156), fama poetino de Song-dinastio, havis profundan amon al la edzo. Ili ofte improviziis poemojn en sia florplena ĝardeno en hela lunlumo. Poste la edzo faris longan vojaĝon, kaj Li Qingzhao sentis teruran solecon. Ŝi esprimis sian enuecon kaj solecon tiel, ke “kurteno flirtas en okcidenta vento, mi estas malpli dika ol la flava floro (krizantemo)”.

Floroj estas kunligitaj ĉiam kun la plej bela sento de la homoj. Tia fenomeno originis de la 10-a jarcento a.K. En la “Libro de Poezio” de tiu tempo estas multaj amkantoj priskribantaj enamiĝintajn gejunulojn, kiuj esprimis sian amon per donacado de floroj. Kaj tiu moro el antikva socio ankoraŭ daŭras en la sudokcidenta parto de Ĉinio.

## “FLORREĜO” KAJ “NASKIĜTAGO DE LA FLOROJ”

La dignoplena kaj nobeleca peonio kun delikata aromo de antikve estas nomata “nacia belulino”. Origine peonio kreskis en nordokcidenta Ĉinio. La kortego de Tang-dinastio prenis Chang’an (nun Xi’an) kiel ĉefurbon kaj venigis de diversaj lokoj de la lando la kompetentajn florkulturistojn por kulturigi diversaspecajn peoniojn en la imperiestra ĝardeno. En la disflora sezono de peonio la kortego okazigis grandiozan kunvenon en la imperiestra ĝardeno por ĝui la belajn peoniojn. En muziko literatoroj improviziis poemojn. Iu el ili nomis peonion “nacia belulino”, kion tre admiris la imperiestro, kaj li nomis sian edzinon Yang Yuhuan “nacia belulino”, opiniante, ke ŝia beleco estas komparebla kun tiu de peonio.

Sed Wu Zetian, imperiestrino (684-705 sur trono) pli frua ol la supre menciita imperiestro, malbone traktis peonion. En frosta vintro, la ebria imperiestrino ekhavis kapricon kaj ordonis al ĉiuj floroj disvolviĝi. Ĉiuj floroj obeis la ordonon escepte de peonio. Tio incitis la imperiestrion, kaj ŝi ordonis elradikiĝi la peonion kaj transplantigi ĝin en Luoyang. Sed tie la peonio pompe disvolviĝis. De tiam oni per “florreĝo” honoris peonion, sentiman vizaĝe al la aroganta potenculo.

Kvankam arbitra kaj despota, ŝi pasie amis florojn. En la 15-a tago de la dua monato laŭ la luna kalendaro ŝi ordonis al palacaj servistinoj kolekti diversajn florojn, miksi ilin en farunon kaj fari kukojn, kaj donacis ilin al la korteganoj. Laŭ arkeologia esplorado, tiu kutimo estiĝis en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (722-481 a.K.). Kiam la tero estis kovrita de pompaj floroj en printempo, la kortego festis por memori flordiinon, kiu prizorgas ĉiujn florojn en la mondo. Imperiestrino Wu Zetian energie emfazis tiun feston kaj la kutimo ekfuroris inter la popolo, kaj la popolo nomis tiun aktivadon “Naskiĝtago de la floroj”. Sed la maniero estis malsama al tiu en la kortego: la popolo ornamis branĉojn plenajn de floroj per ruĝaj silkoj kaj “flordiinaj lanternoj”, kaj en la nokto la popolo gaje promenadis kune kun amikoj inter branĉoj kun floroj iluminitaj...

# Vizito al Makao (II)

de ZHANG MEIZHI

## LA MAKAANOJ REGOS SIAN REGIONON

Kvankam mi volis daŭrigi mian promenadon ĉe la maro por ĝui pli da vidindaĵoj de Makao, tamen mi devis fari pli gravan aferon. En la lastaj tagoj la makaanoj okupiĝis pri elektado de la unua estro de la Speciala Administra Regiono de Makao (SARM). Propraokule rigardi la elektadon estis malofta ŝanco por mi. Mi rezignis ekskurson kaj rapidis al la Prepara Komitato de SARM.

Efektive la atmosfero de la komitato tute ne similis al tiu ĉe la maro. Kvankam okupita, s-ino Tina Ho Teng Iat, ĝenerala vicsekretario de la komitato, konigis al mi ilian laboron. Ŝi aspektis sagaca, kapabla kaj milda. Ŝia parolo estis lakona



S-ino Tina Ho Teng Iat

kaj klara. Ŝi estas filino de komerca eminentulo de Makao. Nun ŝi devas kaj zorgi pri sia kompanio kaj okupiĝi pri laboro de la komitato. Sen rekompenco, ŝi estas tamen serioza al la laboro kiel aliaj membroj de la Prepara Komitato, ĉar ŝi estas fiera, ke ŝi povas fari ion por la reveno de Makao.

Post sia reveno al Ĉinio, Makao fariĝos alia speciala administra re-



S-ro Edmund Ho Hau-wah

giono kiel Hongkong kaj praktikos la politikon "unu lando, du sistemoj; Makaosubregado de makaanoj". La Prepara Komitato de SARM havas la ĉefan taskon garanti sukcesan transiron de Makao kaj praktiki la Bazan Leĝon de SARM kaj la Komunan Deklaron de Ĉinio kaj Portugalio. S-ino Tina Ho Teng Iat diris: "La Prepara Komitato fondiĝis en la 5-a de majo 1998. Poste ĝi faris 9 laborojn inkl. preparan laboron por starigi la unuan registaron de SARM, ellaboron de procedo por starigi la unuan leĝofaran komitaton, prezenton de opinioj pri gravaj leĝaj problemoj kaj pri aranĝo de ceremonio de fondo de SARM.

La elektadon de la unua estro de SARM atentis diversaj soci-tavoloj de Makao, ĉar antaŭe tiu grava posteno estis neniam okupita de makaano. Ĉi-foje la makaanoj povis elekti sian ĉefon, kio montras, ke la makaanoj vere fariĝos mastroj de Makao. S-ino Tina Ho Teng Iat diris, ke en la lastaj 20 tagoj,

por aliĝi al la Elekta komitato por SARM, sin anonciis makaanoj mem, inter kiuj troviĝis eĉ pli-ol-90-jara maljunulo kaj familio de tri generacioj. En 6 tagoj por kandidatiĝi venis enskribiĝi 9 personoj, inter kiuj 5 havis kvalifikon. Post balotado, Edmund Ho Hou-wah kaj Stanley Au Chong Kit fariĝis kandidatoj.

## LA UNUA ESTRO ELEKTITA

La 15-an de majo, post reveno en Pekinon mi informiĝis, ke Edmund Ho Hau-wah estis elektita. En la 20-a de majo, Zhu Rongji, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, subskribis la mandaton, ke Edmund Ho Hou-wah estu la unua estro de SARM kaj enoficiĝu, la 20-an de decembro 1999.

Edmund Ho aĝas 44 jarojn. Li iam studis en Kanado kaj akiris rangon de industria kaj komerca administrado kaj titolon de registrita ĉefkontisto. Lia patro ekfamis pro fondo de Banko Tai Fung antaŭ kelkdek jaroj. En 1983 pro



# Sinjoro Dongguo kaj lupo (Fablo)

de MA ZHONGXI

**I**UTAGE sinjoro Dongguo vojaĝis rajdante sur azeno kun sako da libroj.

Subite lupo postkuris lin kaj diris kun maltrankvileco: "Sinjoro, savu min! Ĉasisto persekutas min, lasu min kaŝiĝi en via sako. Mi neniam forgesos vian helpon." Post momenta hezito sinjoro Dongguo kompatis ĝin kaj konsentis savi ĝin. Elpreninte la librojn el la sako, li provis ĉiajn rimedojn por ensakigi ĝin, sed ne sukcesis, ĉar la sako estis ne tiom granda por la lupo. La ĉasisto pli kaj pli proksimiĝis kaj jam klare aŭdiĝis trotado de ĉevalo.

La lupo maltrankvile diris: "Sinjoro, rapidu, mi petas. Kiam la ĉasisto atingos, mi pereos!" Ĝi kuŝis surtere, kuntiriĝis kun la kapo kunigita kun la vosto kaj petis sinjoron Dongguo ŝnuri ĝin. Laŭ ĝia peto, sinjoro Dongguo ŝnuris ĝin, ensakigis ĝin, kovris ĝin per libroj, metis la ligitan sakon sur la azenon kaj daŭrigis sian iradon.

Venis la ĉasisto. Ne vidinte la lupon, li demandis sinjoron Dongguo: "Ĉu vi vidis lupon? Kien ĝi kuris?"

Sinjoro Dongguo respondis: "Ne, mi ne vidis lupon. La vojo estas forko-abunda. Eble ĝi fuĝis

per alia vojo."

La ĉasisto foriris kaj la ĉevalo trotado pli kaj pli malproksimiĝis. La lupo diris en la sako: "Sinjoro, mi povas eliri el la sako." Sinjoro Dongguo ellasis ĝin el la sako. Etendinte la membrojn kaj lekinte la lipojn, la lupo elmontris sian kruelecon, malfermis sian grandan faŭkon kaj diris al sinjoro Dongguo: "Mi ege malsatas. Se mi ne trovos manĝaĵon, mi mortos de malsato. Ĉar vi savis min unufoje, savu min ankoraŭfoje kaj lasu min manĝi vin!" Dirinte, ĝi ĵetis sin al sinjoro Dongguo.

Sinjoro Dongguo ege surpriziĝis kaj evitis ĝin kurante ĉirkaŭ la azeno. Sed kien li kuris, tien ĝi persekutis. Sinjoro Dongguo anhelis pro lacego kaj senĉese insultis: "Vi maldankema! Vi maldankema!"

Vesperigiĝis. Alvenis maljuna kamparano kun hojo sur la ŝultro. Sinjoro Dongguo tuj haltigis lin kaj petis lin fari juĝon. Rakontinte tion, kio okazis, li demandis: "Ĉu mi devas esti manĝaĵo de la lupo?" Sen

atendi la respondon de la maljuna kamparano, la lupo sekvis: "Ĝus li kunligis miajn kruojn, metis min en la sakon kaj premis multajn librojn sur min. Ĉu li volis savi min? Evidente, li intencis sufoki min. Ĉu mi ne devas manĝi tian homon?"

Iom pripensinte, la maljuna kamparano diris: "Mi ne kredas. Ĉu eblas enigi la lupon en tiom malgrandan sakon? Mi devas vidi, kiel la lupo ensakiĝos."

La lupo konsentis. Ĝi kuŝis surtere kaj kuntiriĝis. Sinjoro Dongguo ĝin ŝnuris kaj ensakigis. La maljuna kamparano tuj ligis la sakon kaj diris al sinjoro Dongguo: "Ne eblas, ke tia sovaĝa besto, kiu manĝas homon, ŝanĝos sian naturon. Estas danĝere, ke vi kondutis humane kontraŭ la lupo!" Li batis la lupon per la hojo ĝis ĝi mortis.

Sinjoro Dongguo ekkomprenis kaj diris al la maljuna kamparano: "Koran dankon pro via helpo. Mi ĉiam memoros tiun lecionon." ■



kancero li devis revoki sian filon el Hongkong por administri la bankon, kiu falis en malfacilon. Post klopodado de Edmund Ho la banko estis revivigita. Pro tiuflanka kapablo li estis subtenata de makaanoj ekde la komenco de la elektado.

Dum mia vizito al Makao, mi volis intervjui Edmund Ho, sed pro sia okupiteco li rifuzis ĝentile. Poste mi donis al lia sekretario

paĝon da demandoj. Neatendite mi recevis 4 paĝojn da respondoj de Edmund Ho. Videble, li estas devokonscia.

Poste mi vidis lin en oratora kunveno por elekto organizita de iu societo. La kunveno estis plenkona de homoj. Oni bombardis lin per demandoj "Kiel vi ŝanĝos la malfavoran ekonomian situacion de Makao?" "Kiel vi solvos la problemon de publika sekureco?" "Kiel

vi traktos la indiĝenajn portugalojn en Makao?" Fronte al diversaj demandoj li ĉiam tenis sin memfida, sincera kaj senhasta. Ne konante la dialekton de Guangdong, tamen laŭ aplaŭdado mi konsciis, ke li estas alte taksata.


Finfine li estis elektita. Sed pli da malfacilaj taskoj sekvos lin. Li promesis, ke malgraŭ multaj malfacilaĵoj li bone servos al la makaanoj. ■

Ĉe la vilaĝo Dashankou en Huailai-gubernio, Hebei-provinco, staras parto da antikva Granda Muro kun historio de pli ol 2 mil jaroj. Ĝi portas la nomon Granda Muro Yanbei. Ne tiel grandioza kiel tiuj konstruitaj en la dinastioj Qin (221 a.K. — 206 a.K.) kaj Ming (1368-1644), ĝi estas tera muro kun multaj interligitaj blokoj. Kun longeco de pli ol 40 km en la gubernio, ĝi etendiĝas de oriento al okcidento. Eble pro sia ordinareco kaj simpleco, ĝi ne estas vaste konata.




Ĝuste ĉe ĝi kuŝas la vilaĝo Dashankou. La muroj de la kvadrata urbeto dependa de la Granda Muro

Yanbei kaj destinita por garnizonado servas kiel tiuj de la vilaĝo, kortoj kaj domoj de vilaĝanoj. En la vilaĝo vivas pli ol 150 familioj. Antaŭ pli ol 500 jaroj migrantoj el Shanxi-provinco fiksloĝiĝis en la loko. En la vilaĝo estas 3 grandaj soforoj, kiuj aĝas almenaŭ 300 jarojn.

Kvankam la vilaĝo distancas de la urbo Pekino je nur 50 km., tamen la vilaĝanoj plejparte vivas vivon de tradicia terkulturo: iri al kamlaboro ĉe leviĝo de la suno kaj hejmenreveni ĉe ĝia subiro. Ili opinias, ke ili estas nek riĉaj nek malriĉaj, ĉar neniu el ili almozpetas kaj neniu inter ili estas granda riĉulo.



# Vilaĝo ĉe antikva Granda Muro



1	3
2	4
	5
	6

1. Tradicia terkulturado
2. La vilaĝo ĉe antikva Granda Muro
3. Reveno de kamlaboro
4. Ripozo
5. Familio
6. Sur la sportejo de la elementa lernejo de la vilaĝo

BAZARO DE ANTIKVAĴOJ  
EN TIANJIN

En Shenyang-strato de la urbo Tianjin bonorde staras pli ol 100 butikoj de antikvaĵoj, ĉiu kun klasik-stila ŝildo sur lintelo, kaj estas ĉ. 500 standoj kun komercaĵoj sub la libera ĉielo. Tie vendiĝas porcelanaĵoj, mebloj el malmola ligno, horloĝoj, skribiloj, sigeliloj, pentraĵoj, kaligrafaĵoj, kopioj de steleaj epigrafoj, metiartaj vestoj, kuriozaĵoj, jadaĵoj, antikvaj moneroj, kuponoj, bambuaĵoj, bronzaĵoj k.a. La strato impresas kiel en la antikveco.

En ĉiu ĵaŭdo kaj ĉiu vendredo la strato estas tre vigla. Tiam komercistoj el diversaj lokoj venas tien. Tie aktivadas ankaŭ kolektantoj kaj

revendantoj de antikvaĵoj. Ĉar la porcelanaĵoj estas malfacilaj por porti, tial vespere oni vendas ilin je tre malalta prezo. Iuj aĉetas antikvaĵojn tie kaj revendas ilin en Pekino kontraŭ alta prezo sabate.

Por trovi aŭtentikajn antikvajn meblojn, skribilojn kaj metiartaĵojn, oni devas havi sciojn distingi la verajn disde la falsaj. S-ro Zhang Zhong, honora prezidanto de la Tianjin-a Asocio de Popolaj Artistoj, ofte ekspertizas antikvaĵojn por siaj amikoj. Li estas klara, ke havigi al si antikvaĵojn estas malfacile, ĉar nun multaj volas aĉeti antikvaĵojn, sed la aŭtentikaj estas pli kaj pli malmultaj, tial oni malfacile trovas rarajn antikvaĵojn. S-ro Zhang vizitas la bazaron ĉiusemajne. Foje li rimarkis teleron far-

itan en Song-dinastio. La vendanto postulis nur 30 juanojn (ĉ. 4 usonaj dolaroj). Li tuj pagis kaj foriris kun kontento.

S-ro Yin estas sperta en ekspertizado de Yixing-aj tekruĉoj pro ŝato de teo. Laŭ lia opinio la teo infuzita en Yixing-a tekruĉo estas aparte aroma. En Tianjin estas multaj delikataj Yixing-aj tekruĉoj konservataj de altranguloj kaj ordinaraj popolanoj. Por s-ro Yin estas plezuro serĉi tiajn kruĉojn. Nun la nombro de tiaj kruĉoj de li ekspertizitaj jam superas pli ol dek milojn.

REKONSCIIGU  
"VEGETALULOJ"

Prof. Li Zizhong, direktoro de instituto de cerbaj malsanoj en Guangdong-provinco, faris esploradon pli ol 30 jarojn kaj akiris rimarkindajn sukcesojn. La de li farita medikamento povas konduki la materion, kiu povas daŭrigi la fiziologian funkcion de la nervoj, en neŭronojn tra la cerbeta bariero kaj aktivigi la dormantajn ĉelojn de la cerbaj nervoj.

Prof. Li opinias, ke antaŭe la medikamentoj kontraŭ cerbaj malsanoj plejparte ne povis eniri en la cerbon tra la cerbeta bariero kaj sekve ne estas efikaj por kuraci la malsanojn. Ĉiutage velkas 50 mil cerbaj ĉeloj. Sanaj homoj povas rehavigi al si ĉelojn pere de regenerado por teni ilin en la normala kvanto, sed pro cerba vundiĝo malpliigis la regenera kvanto, kiu estas malpli multa ol tiu de la velkantaj. Tio do kaŭzas malsanojn rilatajn al cerba degenero, kiaj demenco, paralizo, mens-debileco kaj cerba paralizo.

Prof. Li diris, ke la centra nerva sistemo de la homa cerbo estas kapabla reproduktiĝi kaj la nervaj ĉeloj ne komplete mortas tuj post la difektiĝo. Se oni nutras la ĉelojn difektitajn kaj dormantajn per sufiĉe da oksigeno kaj sango, ili povas rekonsciigi. La de prof. Li inventita medikamento estas efika ĉi-flanke.

La terapio de prof. Li restari-

Bazaro de antikvaĵoj en Tianjin




gis plurajn denaskajn cerbajn paralizulojn, ebligis al mens-debilaj infanoj viziti lernejon kaj redonis al senilaj demenculoj la kapablon mem aranĝi sian ĉiutagan vivon, tiel ke multaj "vegetaluloj" rekonsciigis el la longatempa komato.

Post analizo de la nova medikamento farmakologoj venis al la konkludo, ke la medikamento estas efika por protekti la nervajn ĉelojn kontraŭ manko de oksigeno kaj sango je 93% kaj regeneri la ĉelojn de la centra nerva sistemo je 63.9%.

## VIVO EN TEMPLO

En Tibeto la 7-jaraj knaboj ekvizitas lernejon, kio neniom diferencas de aliaj lokoj de Ĉinio, tamen estas ankaŭ iuj knaboj, kiuj ne vizitas lenejon, sed lamaigās en proksimaj temploj. Ĉi-flanke la temploj ne akceptas filojn de oristoj, arĝentistoj, forĝistoj, buĉistoj kaj sepultistoj. Ricevinte aprobon de abato, la knaboj povas entempliĝi kaj devas havi du mastrojn — unu respondecas pri ilia ĉiutaga vivo kaj gvidas ilian konduton kaj la alia zorgas pri ilia lernado de kulturaj scioj kaj sutroj. La mastroj plejparte estas iliaj parencoj, kiaj iliaj onkloj kaj fratoj. La knaboj devas prezenti al la mastroj blankan silkan rubandon, kruĉon da butera teo kaj kelke da donacoj. Unu el la mastroj tondas al ili harojn, sed restigante al ili tufon da haroj en la verto kaj kondukas ilin al la abato, kiu faras al ili mallongan demandon, kaj kiam li certiĝas pri ilia firma volo lamaigi, li preĝas por ili kaj fortondas al ili la lastajn harojn kaj donas al ili lamaan nomon, kiu fariĝas ilia dumviva nomo en la templo.

La entempliĝintaj junaj lamaoj devas servi al siaj mastroj 3 jarojn. Dum la 3 jaroj ili devas ellerni ĉiujn regulojn kaj kutimojn de la vivo en la templo kaj bone observi ilin. Krom servi al la mastroj, ili devas ankaŭ fari laborojn en la templo, ellerni fonetikon, reciti sutrojn kaj



Junaj lama-oj

preĝi en la tibeta lingvo.

Pro malsameco de aĝoj, travivaĵoj kaj servospertoj ili faras malsamajn laborojn en la templo. Iuj el ili studas sutrojn, aliaj recitas sutrojn speciale por beno kaj liberigo de animoj el purgatorio, triaj prezidas nupton kaj funebran ceremonion, kvaraj kuracas malsanulojn, faras aŭguradon, pentradon kaj budhajn statuojn, mimeografi sutrojn kaj ludi religian muzikon kaj kvinaj lernas luktarton por gardi la templon kaj ĉefajn lamaojn.

La lamaoj promociiĝas laŭrange kaj fine post publika argumentado akiras la rangon *gesi*, la plej altan rangon de Gelu-sekto en la tibeta budhismo. Oni nomas *gesi* budhisma doktoreco.

La ĉiutaga vivo en la lamaisma templo komenciĝas en la horo, kiam oni klare vidas siajn manplatajn liniojn eksterdome. Tiam la deĵoranta lamao suriras la tegmenton de la plej alta domo de la templo, faras manklakadon tri-foje kaj ripetfoje per sia basa voĉo krias: "Avalokitesvaro benas nin!" Tiam ĉiuj lamaoj de la templo ellitiĝas kun kriado kaj eniras en la grandan sutran halon por fari matenan preĝon. Ĝenerale en la templo estas pluraj sutraj haloj, kaj la plej granda povas enteni cent homojn. Dum sutrorecitado speciala lamao proponas al la recitantoj buteran teon. Tiam oni trinkante buteran teon recitas sutrojn aŭ aŭskultas

predikadon.

## EKSPOZICIO DE PAPILOJ

Maljunulino kun arĝentaj haroj ridetas al sia edzo, fotanta proksime. Ŝi tenas girlandon el oraj, ruĝaj kaj purpuraj floroj en la manoj. Sur la floroj ripozas 3 grizaj papilioj, kiuj frapetas per siaj belaj flugiloj.

Jen sceno en la Monda Hortikultura Foiro en Kunming, Ĉinio. En la ekspoziciejo kovrita per reto flugas pli ol 4 000 diverskoloraj papilioj. Tie oni ĝojas kune kun la belaj papilioj en la naturo.

En la ekspoziciejo oni rimarkas, ke belaj papilioj bonvenigas la vizitantojn. Tie prosperas floroj, ŝaŭmas kaskado de sur ŝtona monto. Dancas papilioj grandaj kaj malgrandaj, ŝvebante en la aero aŭ haltante sur arbobranĉoj kvazaŭ petaloj. Estas ankaŭ multaj papilioj, kiuj neniam vidis tiel multe da turistoj kaj sin kroĉas al la reto pro timo.

Inter la floroj estas pletoforma objekto kun kelke da bananaj ŝeloj sur si. Kelke da papilioj flugas tien kaj haltas sur ili. Oni alproksimiĝas kaj trovas, ke la papilioj estas manĝantaj la bananajn ŝelojn.

Ĉinio estas ideala loko por esplori papiliojn, ĉar tie estas dezertoj, maroj, montoj kaj ebenaĵoj, kun diversaj tersurfacoj kaj klimatoj. Nun en Ĉinio estas 1 500 specoj de papilioj, kiuj konsistigas dekonon de tiuj de la mondo.

# “Ĉar mi bone konas ilin”

de XIANG HONG

**M**I interkonatiĝis kun Zhou Xiuqing pro tio, ke ŝi desegnis la plej grandan ĉinan poŝtmarko-serion el 56 pecoj. La poŝtmarko-serio estos emisiita la 1-an de

oktobro 1999, omaĝe al la 50-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Ĝi, titolita “Unuiĝo de ĉinaj nacioj”, prezentas la 56 ĉinajn naciojn. Antaŭ 2 jaroj la Ĉina Poŝtmarka Kompanio petis desegnaprojektojn de la poŝtmarko-serio,

kaj tiu de Zhou Xiuqing estis elektita. Mi decidis intervjui ŝin. Survoje al la hejmo de emerita profesorino Zhou mi konjektis, ke ŝi rakontos al mi interesan rakonton pri la poŝtmarkoj, tamen ŝiaj vortoj estis tute ekster mia atendo.



S-ino Zhou Xiuqing

## **"MI NE SENTIS MALFACILON"**

Apenaŭ mi sidiĝis kaj eĉ ne havis tempon por ĉirkaŭrigardi la ĉambron, mi jam elverŝis miajn vortojn: "Laŭ mi estas malfacile fari tiel multajn desegnojn kaj harmonie kombini ilin en unu poŝtmarko-serio."

"Malfacile?" s-ino Zhou iom pensis kaj skuis la kapon kun longaj orelingoj dancantaj super ŝiaj ŝultroj. "Ne, mi ne sentis malfacilon."

Kvazaŭ konsolante min, ŝi aldonis: "Tamen al la ĝenerala desegno mi ja dediĉis multe da tempo kaj energio."

S-ino Zhou daŭrigis, ke en adjudiko de la desegno-projekto nur bildoj pri tibetano, mjaŭo, jio kaj ujuguro estis postulataj. Ŝin inspiris la popoldiro, ke "ĉinoj estas posteuloj de drako", kaj en la dekstra kaj maldekstra margenoj de paperfolio kun la poŝtmarko-serio ŝi pentris du drakojn simbolantajn respektive la Flavan Riveron kaj Yangzriveron. La du drakoj rigardas unu la alian kaj en la malsupra margeno iliaj vosto kuniĝas. Iliaj korpoj kun dent-forma dorso kadras la paperfolion de poŝtmarko-serio. La dentoj ne nur montras la trajton de poŝtmarko, sed ankaŭ aludas la Grandan Muron. Ĉar la desegnaĵo estis jam sendita al la Poŝtmarko-kompanio, mi ne povis propraokule vidis ĝin, tamen s-ino Zhou gaje klarigis al mi kun gestoj, kaj en ŝia mieno mi legis, ke ŝi kontentis pri la desegno.

"Mi faris du desegno-projektojn, unu bildigas dancojn de la 56 nacioj de Ĉinio kaj la alia ilian ĉiutagan vivon. Fine la unua estis akceptita pro la festa etoso."

"Ĉu la konkurenco estas akra?" demandis mi.

"Kion diri? Eble jes," ŝajne s-ino Zhou nenion atentis krom la desegno. Tamen ŝiaj vortoj sentigis al mi la gravecon de la konkurenco. La poŝtmarko-kompanio donis grandan atenton al emisio de la poŝtmarko-serio. La peto pri projektoj komenciĝis en 1997, kaj la partoprenantoj estis ĉefe profesiaj poŝtmarko-desegnistoj kaj pentristoj de famaj belartaj universitatoj el la tuta lando.

"Multaj artistoj el la konkurantoj tre kapablas prezenti nacimalplimultojn en siaj verkoj, kiel do vi venkis ilin?" demandis mi.

"Ja estas multaj pentristoj lertaj en farado de pentraĵoj pri nacimalplimulto. Ĝenerale pentristo bone konas nur kelkajn nacimalplimultojn, sed estas ne facile por multaj samtempe prezenti en unu verkaĵo la 56 naciojn."

Kio do estas la avantaĝo de s-ino Zhou?

### **"ĈAR MI BONE KONAS ILIN"**

"Eble mia okupo helpas min. Dum la pasintaj 30 jaroj mi instruis belarton pri nacimalplimulto en la Centra Nacimalplimulta Universitato de Ĉinio, kaj por koni ĉiun nacian kulturon mi vizitis preskaŭ ĉiujn nacimalplimultajn regionojn, mi tre bone konas ilin!"

Menciante la ĉinajn nacimalplimultojn, s-ino Zhou torente parolis pri iliaj kostumo, hararanĝo, danco kaj totemo. Ŝi diris, ke ŝi harmonie kunvivis kun nacimalplimultanoj en iliaj vilaĝoj kaj ili varme akceptis ŝin. Ŝajnas al mi, ke ŝi estas folkloristino.

"Kial vi ŝatas folkloron?" mi scivolis.

"En la komenco mi kontaktis ĝin pro profesia laboro, kaj poste mi rimarkis, ke nacimalplimultaj kulturoj estas tre riĉaj.

La nacimalplimultanoj estas bonkoraj, saĝaj kaj interesaj. Mi estimas ilin kaj amas ilian kulturon."

S-ino Zhou mallaŭdis, ke iuj faris pentraĵojn pri la vivo de nacimalplimultanoj pro scivolemo. Ŝi diris: "Se vi bone konas ilin, viaj verkoj bildigas ilin ne nur en formo."

Kiam mi sciigis, ke s-ino Zhou desegnigis ankaŭ 56 unuataĝajn kovertojn (serio) pri la folkloro de la 56 nacioj, mi demandis:

"Ĉu la sama temo ne kondukas al monotoneco de viaj desegnoj?"

S-ino Zhou ridetis: "Ne-eble!" Por pravigi siajn vortojn ŝi gvidis min al sia laborĉambro, kiu komuniĝas kun la balkono. Sunradioj tra iris la fenestron kaj prilumis la grandan skribtablon, kaj la libroŝrankoj starantaj ĉe muroj estis plenaj de libroj.

"La libroŝrankoj estis projektitaj de mi mem." Laŭ fingromontro de Zhou mi rimarkis, ke en la malsupra parto kaj ĉe ambaŭ flankoj de la ŝrankoj estas pli ol 10 tirkestoj plenaj de fotoj, karto kaj aliaj materialoj.

"Tion mi kolektis dum pli ol 30 jaroj. Nia lando estas tiel granda, ke sama nacio en malsamaj regionoj havas malsamajn vivmanierojn. Kostumo de ŝeoj en Anhuiprovinco diferencas de tiu en Fujian-provinco, kaj mjaŭoj en Guizhou-provinco havas kelkdek specojn de kapornamoj."

"Ho, tiel multaj materialoj sufiĉas por via verkado en pluraj jaroj!"

"Jes, antaŭe mi donis grandan atenton al instruado, kaj mia verkado ŝajnas al mi nur ĵus komencita," ridetis la 61-jara Zhou. ■

# La ĉina lingvo kaj la ĉina kulturo (III)

de ZHANG QICHENG

## KREI IDEOGRAMOJN KAJ PENSI FIGURE

Fakuloj asertas, ke ĉinoj kulture pensas konkrete kaj figure. Je la komenco ili kreis la ĉinajn ideogramojn ĝuste laŭ la figuroj de la objektoj. Poste ili faris la vortojn laŭ figura pensmaniero. Ekz., kiam la ĉinoj parolas pri la blanka koloro, ili ŝatas aldoni la vorton "neĝo" antaŭ ĝi por esprimi, ke io havas la blankan koloron kiel la neĝo; ili aldonas la vorton "glacio" antaŭ "fresta" por esprimi, ke io estas glacie fresta. Ne nur al adjektivoj, sed ankaŭ al substantivoj oni emas aldoni vorton por pli figure esprimi ilian sencon. Ekz., oni aldonas la vorton "arĝento" antaŭ la vorto "haro" por esprimi, ke la haro blankiĝas. Kaj kiam oni metas la vorton "ĉerizo" antaŭ la vorton "buŝo", tio indikas, ke la buŝo de virino estas malgranda kaj ĉarma kiel ruĝa ĉerizo. Troviĝas ankaŭ tiaj esprimoj: "manĝajbarelo" por moki tiujn, kiuj scias nur manĝi, sed kapablas fari nenion; "tigro kun ridanta mieno" aludas al homoj, kiuj aspektas mildaj kaj afablaj, sed fakte estas sovaĝaj kaj kruelaj kiel tigro.

Oni ankaŭ figure nomas la bestojn importitajn el eksterlan-

do, ekz., ĝirafoj estas nomataj "longkola cervo", ĉar ĝi havas longan kolon kaj ĝia korpo aspektas kiel cervo; kaj zebro nomiĝas "stria ĉevalo", ĉar ĝi similas al ĉevalo kun brunaj strioj sur sia korpo.

En la ĉina lingvo multaj proverboj kaj idiotismoj estas figure esprimitaj, ekz., "elpreni la lunon el akvo", tio signifas senrezultan klopodon; "altoni piedojn al la pentrita serpento", tio enhavas la sencon "superflua"; "la formiko sur la varmega kaldrono", per tio oni esprimas, ke iu falas en embarason kaj ege senpacientiĝas. Estas idiotismoj faritaj el paroj da antonimoj, ekz., "eliri el vivo, eniri en morton" signifas, ke oni riskas sian vivon pro engaĝiĝo en danĝeran aferon; "ŝati ripozon, malŝati laboron" signifas maldiligentecon; "jesi buŝe, nei kore" estas esprimo de malhonesteco.

Tiaj esprimoj de kvarvortaj frazetoj estas tre koncizaj, klaraj, figuraj kaj impresivaj. Ili estas ritmaj, belsonaj kaj facile memoreblaj. Tiu lingva fenomeno verŝajne estas specifa en la ĉina lingvo, ĉar nur en la kadro de ties speciala strukturo, tio fariĝas ebla.

## DIVERSAJ NOMOJ KAJ SANGA RILATO

Tradicie, la ĉinoj alte tak-

sas la sangan rilaton inter parencoj kaj la familian hierarkion. Tio klare speguliĝas en la diversaj nomoj inter familianoj kaj parencoj. La nomo "onklo" estas dividita en kvin kategoriojn per malsamaj nomoj, nome: A. la pliaĝaj fratoj de patro; B. la malpliaĝaj fratoj de patro; C. la edzoj de pliaĝaj kaj malpliaĝaj fratinoj de patro; Ĉ. la pliaĝaj kaj malpliaĝaj fratoj de patrino; D. la edzoj de la pliaĝaj kaj malpliaĝaj fratinoj de patrino. Kaj la nomo "onklino" estas sammaniere dividita. Estas rimarkinde, ke la kategorioj C, Ĉ kaj D malsamas kiel la kategorioj A kaj B. En tiuj tri kategorioj oni ne distingas la pliaĝajn kaj la malpliaĝajn. Ekz., la pliaĝaj kaj malpliaĝaj fratoj de patrino estas same nomataj "onkloj", sed tiuj de patro nomataj distinge. La kialo estas, ke la antaŭaj estas parencoj kun alia familia nomo kaj ne necesas distingi. Dume la pliaĝaj kaj malpliaĝaj fratoj de patro havas la saman familian sangan rilaton kiel la patro kaj iliaj pozicioj en la familio estas malsamaj kaj tial malsame nomataj. La nomoj "nepo" kaj "nepino" estas alie nomataj, se ili estas gefiloj de fratino; kaj la gefiloj de filino estas nomataj nevo kaj nevino, sed kun adjektivoj "eksteraj", ĉar ili apartenas al alia familio. Same, la gepatroj de patrino estas nomataj



“eksteraj” geavoj.

En la pasinteco ĉinoj kutime strikte obeis la sistemon de familia hierarkio. Sekve estis tia fenomeno: iu mezaĝulo devis nomi iun knabon “onklo” pro tio, ke tiu knabo estas juna frato de lia patro. Tio ŝajnas iom stranga, sed estas natura por ĉinoj.

La supre menciitaj familiaj kaj parencaj nomoj ŝajnas necesaj por okcidentanoj, sed por ĉinoj ili estas nepre necesaj kaj utilaj por eviti miskomprenon.

Nuntempe, tiu sistemo de patriarka hierarkio ne plu estas strikte observata, tamen la diversaj parencaj nomoj ankoraŭ validas, ĉar ili jam ekzistis kelk-mil jarojn kaj fariĝis sociaj kutimoj por ĉinoj. Tamen ili eble iom ŝanĝiĝos estonte, ĉar la infano de gesolinfana paro ne havos onklon, onklinon ks., kaj tiam malmultiĝos diversaj parencaj nomoj.

## LA ĈINA LINGVO KAJ LITERATURO

Oni ofte diras, ke Ĉinio estas lando de poezio. Tio ja ne troigas, ĉar jam en la epoko antaŭ 3 000 jaroj la unua kolekto de 300 poemoj estis kompilita. Poste en Tang-dinastio (618-907), poezio vaste prosperis kaj aperis multaj eminentaj poetoj. Laŭ esploro, en tiu dinastio troviĝis proksimume 2 300 poetoj, kiuj verkis kelkdek mil poemojn kaj eĉ nun ankoraŭ legeblas pli ol 52 000 poemoj, el kiuj pli ol 900 estis el la plumo de Li Bai, “feo de poezio”, kaj pli ol 1 400 verkitaĵoj de Du Fu, “sanktulo de poezio”. En Song-dinastio (960-1279) aperis pli ol 1 400 verkistoj, kiuj skribis pli ol 20 000 alispecajn poeziaĵojn nomatajn *ci*<sup>2</sup>. Sendube, la abundaj poeziaĵoj fariĝis tre valoraj kulturaj heredaĵoj por la ĉina popolo. Ke la antikvaj

ĉinaj literaturistoj faris tiom da verkoj, tio estas vere mirinda afero, kaj tiurilate oni ne povas ne atribui la meriton al la ĉina lingvo, kiu ne nur havas riĉan vorto-provizon kun granda esprimovo, sed ankaŭ tre elastan strukturon, kiu ebligas al la poetoj tre libere verki sen la kateno de gramatikaj reguloj. Ekz., ili ofte uzis adjektivon kiel verbon, precipe en poeziaĵoj. Iu fama poeto de Song-dinastio verkis jenan version: “Printempa vento denove verda (verdigas) la sudan bordon de la rivero”. Ĉu tiu adjektivo “verda” ne donis tre fortan impreson al la legantoj pri la bela printempa pejzaĝo? La verso prezentis bildon. Kaj ĝuste al kreado de bildo en poezio strebis la antikvaj ĉinaj poetoj.

Krome, ili ne rekte priskribis sian senton, sed implicis ĝin en la priskribita pejzaĝo. Ekz., du poetoj de Tang-dinastio priskribis la vesperan pejzaĝon po per du versoj. Unu el ili verkis: “La subiranta suno bele brilas, tamen la vespero proksimiĝas”; kaj la alia skribis: “Ne diru, ke la suno subiras, ĝia brilo ankoraŭ en la ĉielo plenplenas”. La antaŭa implice esprimis sian ĉagrenon pro maljuniĝo, kaj la lasta aludis, ke li ankoraŭ optimisme energias malgraŭ maljuniĝo.

Ĉiu ĉina ideogramo havas nur unu silabon. Tio rezultigas multnombrajn homonimojn. Tio certe estas malavantaĝo de la ĉina lingvo, sed aliflanke avantaĝo por la poetoj, ĉar dank’ al tio ili povas elekti konvenajn ideogramojn por riĉigi la ritmojn kaj belsonigi siajn verkojn.

Kompreneble, en la literatura kampo ĉinoj kreis ne nur poeziaĵojn, sed ankaŭ dramojn, romanojn, novelojn, eseojn k.c. Tiuj belartaj verkaĵoj treege

abundas. Ili estas allogaj legaĵoj por la ĉina popolo de ĉiuj generacioj. Ili ankaŭ fariĝas neelĉerpeblaj materialoj por filmoj kaj televidaj dramoj.

Krom la belartaĵoj, mi volas menci ankaŭ historiajn kaj geografiajn verkojn. En Ĉinio estas tre bona tradicio verki historiajn verkojn pri la gravaj eventoj kaj fame konataj personoj de ĉiu dinastio. Nun jam estas 24 historiaj verkoj pri la pasintaj dinastioj, en 3 240 volumoj. Alia bona tradicio estas verki librojn pri geografiaj situoj, historiaj okazaĵoj, ekonomiaj kaj kulturaj atingoj de diversaj lokoj. Tiaj libroj troviĝas preskaŭ en ĉiu gubernio. Kaj en Ĉinio estas pli ol 2 000 gubernioj, sekve la kvanto de tiaj verkoj estas tre okulfrapa.

Krome, estas menciindaj ankaŭ verkoj pri ĉina medicino, pri strategio kaj taktikoj, ekz., la fama verko de Sunzi (ĉ. 500 a.K.) kaj budaismaj sutroj ĉinigitaj el sanskrito ktp.

Oni kutime priskribas la abundajn ĉinajn klasikaĵojn kiel vastan maron. Kaj kiel ujo de tiu granda maro estas la malgrandaj kvadrataj ĉinaj ideogramoj. Sendube, la ĉinaj intelektuloj tre fieras pri tio, kaj iuj el ili eĉ diras, ke la ĉinaj ideogramoj disvastiĝos internacie kaj multe kontribuos al la monda kulturo en la estonta jarcento. Tio eble troigas. Tamen estas fakto, ke nuntempe pli kaj pli multaj fremdlandanoj kun granda intereso lernas la ĉinan lingvon kaj ĝiajn ideogramojn por ĝui la altvaloran ĉinan kulturon. ■

1. Ĝenerale, la plej aĝa filo havas pli da prestiĝo kaj rajtoj en la familio.

2. Alia speco de ĉina poeziaĵo, verkita laŭ certa melodio en fiksitaj strukturo.

# Pli kaj malpli...

de AN KANG

**M**I pensas, ke ĉiuj havas sian propran metodon por sanprotektado. Sube mi konigos la mian, t.e. malpli da avidoj kaj pli da kontentoj, malpli da paroloj kaj pli da pripensoj, malpli da ripozoj kaj pli da laboroj, malpli da manĝoj por ĉiu fojo.

Koncerne la t.n. malpli da avidoj kaj pli da kontentoj, ĉi tie la avidoj temas pri privataj intereso kaj volupto. Oni diras, ke kiuj multe avidas je privataj intereso, ofte ĉagreniĝas pro siaj personaj gajnoj kaj perdoj, ĵaluzas alies sukcesojn kaj cerbumas jen pri tio jen pri alio, tiuj konstante malĝojas kaj eĉ malsanas fizike kaj anime. Oni ne devas esti voluptama. La modera seksumo estas taŭga, sed ne faru tion tro. Ni ne aprobas seksan abstinadon, ĉar tio povas kaŭzi mensan ĉagrenon kaj eĉ malsanon.

Nun pri la t.n. malpli da paroloj kaj pli da pripensoj. Tro multe da paroloj malutilas al cirkulo de la vitala energio kaj damaĝas la spiriton. Tro da paroloj en ekscitiĝo kondukas al koleremo, kio malutilas ne nur al la spirito sed ankaŭ al la sano. Oni devas multe pensi, kio ne kondukas al atrofio de cerbaj ĉeloj kaj protektas la maljunulojn

kontraŭ demenciĝo. Estas bone, se oni pli multe pensas, legas, skribas, ludas ŝakon ktp. por teni sanon de la cerbo.

Nun pri la t.n. pli da laboroj kaj malpli da ripozoj. Ni opinias, ke la vivo dependas de movoj. Koncerne tion, la ĉinoj ofte diras: "Akvo kura, akvo pura." La ĉinoj opinias, ke tro longa kuŝado malutilas al cirkulo de la vitala energio kaj tro longa sidado malutilas al muskoloj. Sen konvena movo la vitala energio kaj sango cirkulas ne facile kaj se tio daŭras tro longe, do okazas diversaj malsanoj, tial la konvena cerba kaj fizika movado utilas al mallaciĝo kaj longa vivo. La sportoj estas precipe gravaj por la mezaĝaj kaj maljunaj homoj, kiuj ŝatas kvieton sed ne movadon, kio povas konduki al troa dikeco, kardiovaskulaj malsanoj, diabeto kaj osta malkompakteco. Estas tre grave, ke oni faras sportojn modere kaj ofte, sed ne de tempo al tempo nek draste. Oni devas preni la fizikajn sportojn kiel nepran lecionon dum la tuta vivo. En la maljuneco oni devas fari ilin konvene por malrapidigi metabolon kaj teni la vivon juna dum longa tempo.

Nu, pri la t.n. malpli da manĝoj por ĉiu fojo. Ĝenerale dirite, tro da manĝoj malutilas al lieno kaj

stomako. Tro da manĝoj ŝarĝas ankaŭ la koron de maljunuloj kaj eĉ kaŭzas kardioprostracion. Tro da manĝoj facile kondukas al korpulenteco, kiu estas grava malamiko de la homa sano. Ĝi povas kaŭzi kormalsanon, hipertension, diabeton k.a., tial por longe vivi oni nepre devas deteni sin de supernutrado. Nun oni scias, ke neniu natura manĝaĵo donas ĉiujn nutrajn elementojn al la homoj, tial racia dieto devas konsisti el plurspecaj manĝaĵoj. Por diri konkrete, oni devas preni pli da bestaĵoj por levi la kvanton kaj kvaliton de proteinoj, tamen ne tro! Prenu pli da kokaĵo kaj anasaĵo, akvoproduktaĵo kaj lakto, sed evitu adipozon. Prenu pli da sojfabaj manĝaĵoj kaj prenu kovenan kvanton da greno kaj multspecajn manĝaĵojn por teni ekvilibron de la konsisto de la asimilitaj nutroj. Ĉiutage prenu ĉ. 500 gramojn da legomoj inkl. de fungoj, kiuj estas ne nur riĉaj je proteinoj, sed ankaŭ havas konvenan kvanton da aminoacidoj kaj multe da mikroelementoj utilaj al organisma imuneco.

La supre diritaj metodoj estas cititaj el mia propra praktikado. Por pli efika sanprotektado oni devas resumi siajn proprajn spertojn por trovi metodon plej taŭgan kaj efikan. ■

## Nekrologo

Maria Becker-Meisberger (1925-1999), fidela leganto de "El Popola Ĉinio" dum pli ol 40 jaroj, forpasis la 1-an de majo 1999. Ŝi eklernis Esperanton en 1956. Ŝia unua internacia renkontiĝo kun esperantistoj okazis en Moskvo en 1957. Krom la granda socia engaĝiĝo en komunumo kaj paroĥejo ŝi aktive partoprenis en la Esperantomovado. Ŝi iam estis vicprezidantino de la Sar-

landa Esperanto-Ligo. 17-foje ŝi partoprenis en UK. Ŝi ankaŭ bone komprenis la triŝtupan lingvoteston. Ŝi faklingve verkis en Esperanto kuirreceptojn, unue dum pli ol dek jaroj serion en la gazeto "Monato" kaj rezulte de tio aperis la libro "Interpacie kuiri". La dialekta libro ekzistas ankaŭ en germanlingva traduko kaj jam parte en Esperan-



## En mara mondo



Omaĝe al la 22-a Konferenco de la Universala Poŝta Unio kaj la Monda Poŝtmarka Ekspozicio '99 en Pekino, la ĉina poŝta administracio emisiis en la 12-a de decembro 1998 poŝtmarkan blokon el 9 pecoj kun la titolo "En mara mondo". Sur la meza peco (prezo neindikita) estas Xisha-insularo en la Suda Ĉina Maro, kun roza koralo en marakvo kiel la fono.

Ĉiu el la aliaj 8 pecoj en la poŝtmarka bloko kostas 2 juanojn. La poŝtmarkoj prezentas tre valorajn vidindajn fiŝojn en la Suda Ĉina Maro.





Lageto Nigra Drako ĉe Lijiang-rivero

Foto de WAN DIGONG

ISSN 0032-4361

09 >



世界语《中国报道》一九九九年第九期

(本刊代号：二一九一五) 国内统一刊号：CN11 1339/G2